

Zagreba Esperantisto

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

සංස්කෘතිය
ප්‍රකාශනප්‍රථමය

universala
esperanto
asocio

wereld
esperanto
vereniging

176

Universala Esperanto-Asocio

178

Ĉi-numere legu pri:
**RAPORTO EL LA UNIVERSALA KONGRESO
BLINDULOJ KONGRESIS EN PREMANTURA
OSIEK-KONFERENCO EN ĤEMPETER
STARTIS LA PROJEKTO DE DOKUMENTA
ESPERANTO-CENTRO
MECENATA FONDUSO PREPARATA
INTERVJUO KUN LENA KARPUNINA**

4

2008



Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa redaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Durdevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Redaktejo kaj ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Durdevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Marica Brlečić, Snježana
Habulin, Vida Jerman, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Velimir Piškorec, Josip Pleadin

Presis:

Grafokom, Durdevac

Aperritmo:

Ĉiun duan monaton (januaro,
marto, majo, julio, septembro
kaj novembro). En 2008 aperos
ses numeroj.

Jarabono por 2009:

en Kroatio: 75,00 kunaĵoj
al ĝirkonto de UZE
2340009-1110321529
alilande: 15,00 eŭroj
al UEA-konto: uzes-y

Perantoj:

UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam
libroservo@co.uea.org

Orbis Pictus, Via Parini 5
IT-34129 Trieste
orbispictus@iol.it

RESUMO

Somero igis nin mallaboremaj, kaj tial malfruis tekstoj por ĉi-tiu numero, sekve ankaŭ ĝi malfruis, malgraŭ niaj streĉoj produkti ĝin pli frue.

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj en la UK en Roterdamo prezentis sian novan kaj valoran projekton - Dokumenta Esperanto-Centro, kiu jam de jaroj "flagras" kiel ideo, kaj kiu akiris jam la unuajn sponsorojn kaj plurajn materiajn donacojn. Pli detale pri tiu temo ni informos vin en la n-ro 5/2008. Neven Kovačić, membro de UZE, kiu estas konata mecenato de Esperanto, decidis fondi apartan fonduson kiu stimulos esperantistojn en iliaj aktivecoj. Ni prezentas la ideon pli detale. Multe da spaco en nia aktuala numero ni dediĉis al interlingvistiko, pro la okazinta interlingvistika konferenco en Amsterdamo, sed multe pli pro intensigo de la preparoj por Interlingvistika simpozio okazonta en novembro en Zagrebo. Renkonte al tiu evento, ni konigas al vi la novaĵojn pri bonfarto de Esperanto en Filozofia fakultato de la kroatia metropolo, kie ĝi estos libere elektebla studobjekto ekde la akademia jaro 2008/2009. Grandan spacon ni dediĉas al la UK en Roterdamo, kien kroataj kaj alilandaj esperantistoj kunvojaĝis en la buskaravano organizita de "Orbis Pictus". Kroataj kongresanoj aktivigis en pluraj programoj, ekz. literaturaj, ĵurnalistaj, kulturaj, kaj Judita Rey Hudeček estis ankaŭ kunorganizinto de Infana Kongreseto.

Ni raportas al vi ankaŭ pri tre sukcesa 74-a IKBE okazinta en Premantura, pri la OSIEK-konferenco en Šempeter, pri la verkista renkontiĝo okazinta en Kroatio kaj pri pluraj eventoj en la sekvontjara kognreslando Pollando.

Eble interesos vin ankaŭ nekutimaj aferoj, kiaj estas la apero de "Onklo Maroje" de fama dubrovniko verkisto Marin Držić, tradukita de Lucija Borčić, en prestiĝa 18-lingva eldono! Ni rememoras pri iamaj sukcesoj de Stephanie Strunjak en Finnlando kaj dediĉas iom da atento al EDE-partio, escepte aktiva. "Veĉernji list" surprizis nin per artikolego "Ĉu vi sakras en Esperanto?", kiu estas verkita en senco de bona ĵurnalismo. Recenze ni prezentas al vi la revuon "Spegulo", kaj nerencele la libron "Kiam mi estis la plej feliĉa en la vivo".

Por vi ni intervjuis la laŭeraton de du prozaj premioj en la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj - Lena Karpunina, kiu gastis en la verkista renkontiĝo en la bieno Njeguš.

Lastpaĝe, sed ne lastgrave, ni prezentas al vi, mallonge per vortoj kaj fotoj, la perlon de Kroatio - la urbon Dubrovnik.

Ĝuu la presitan eldonon de nia revuo kaj vizitu nian renovigitan portalon en interreto!

STARTIS LA PROJEKTO DE DOKUMENTA ESPERANTO-CENTRO

Redakcia
kompilo


En la 93-a Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo, ĉe la kroata stando, per distribuo de okazaj faldfolioj, estis por la unua fojo reklamita la projekto, pri kiu la estraro de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj diskutis jam delonge. Temas pri konstruigo de Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac kun la celo konservi la valoran materialon kiu dum tridekjara kolektado amasiĝis en privata loĝdomo de Josip Pleadin. Jam en la unua numero de "Zagreba Esperantisto" pasintjare aperis la teksto "Studbiblioteko kaj arkivejo formiĝas", kaj la temo estis tuŝita plurfoje tra la paĝoj de nia revuo. Unuamomente UZE nur morale subtenis la projekton, sed nun la afero moviĝas antaŭen.

Intertempe estas trovita konstrutereno kiun disponigis Josip Pleadin, ricevita konstrupermeso kaj farita konstruopiano por konstruado kun 120 kvadrataj metroj da spaco (vidu dekstre), kiu konsistas el oficejo, biblioteko, legejo, tenejo, banejo, necesejo kaj centra ĉambro por muzeaj ekspozicioj, kulturaj programoj aŭ seminarioj. La fina celo estas fari plurmaniere uzeblan Esperanto-centron, kiu evoluigus la Esperanto-Movadon en la regiono, kie Esperanto eĉ ĝenerale estas bone konata kaj flegata dum jardekoj. Sen nia plena engaĝiĝo en tiu projekto, neniam eblos peti koncernajn instancojn pri publika aŭ ŝtata protekto de la kolektita historia materialo, sed per funkciigo de la konstruota centro, tio ja fariĝos reala.

Kombinante la jam ekzistantajn Esperanto-domon en Kostrena, la novan sidejon de KEL en Zagrebo, la bienon Njeguŝ kaj la planitan slavonian "neston" de "Orbis Pictus", kun la Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac, ni farus "ĉenon" da Esperantaj domoj, kiuj estonte povus ludi gravan edukan, kulturalan kaj alispecan rolon por Esperanto en nia lando.

La plenkolora reklamilo distribuita en Roterdamo detale klarigas la manieron de monkolektado necesa por konstruigi la centron (vidu dekstre kaj en la paĝo 105). Ĝi estas laŭpete ricevebla ĉe la redakcia adreso. Kune kun la serĉado de sponsoroj, kies nomoj estos gravuritaj sur speciala tabulo lokita ĉe la ĉefa enirejo de la estonta konstruado, estis lanĉita ankaŭ kolektado de mono per aĉeto de "brikoj". La unuaj "briko"-aĉetantoj estis Marija Jerković kaj Zlata Nanić el Zagrebo, kaj la unuaj sponsoroj Laura Lukać Sancin el Triesto (Italio) kaj Roland Rotsaert el Brugge (Belgio). Estas anoncita sponsoreco de ankoraŭ unu Esperanta societo kaj unu unuopa esperantisto, kiuj ĉi momente volas resti anonimaj.

Kune kun la kolektado de mono, anonciĝis ankaŭ pluraj esperantistoj el Kroatio kaj eksterlando, kiuj volas kontribui per libroj kaj alia dokumenta materialo. Unu esperantisto proponis plene kolorigi la murojn post kiam la konstrulaboroj tion permesos, kaj Radenko Milošević prizorgis planan kamionon da meblaro (librobretoj, ŝrankoj, skribotabloj ktp.), kiun li proprakoste transportis el Zagrebo al Đurđevac, kie ĝi estas deponita kaj atendos konvenan momenton por esti muntita.



KIO ESTAS SPONSORECO?


Sponsorco estas minimuma pago de 250 eŭroj. Ĝi estas pagebla en kelkaj partopagoj, kaj eblas akiri pli altan kategorion per pli granda pago ol antaŭe planite. Ekzistas tri kategorioj:

- 1) ORA SPONSORO - 1.000,00 eŭroj
- 2) ARGENTA SPONSORO - 500,00 eŭroj
- 3) BRONZA SPONSORO - 250,00 eŭroj

Sponsoroj povas ankaŭ plurfoje pagi diversajn sumojn, kaj ili povas fariĝi duobla, triobla aŭ plurobla sponsoro.

La sponsoraj monsumoj estas donacoj, do ili ne estas repageblaj, kaj la sponsorco estos publike aperonta en la listo en "Zagreba Esperantisto". Krome, la nomoj de ĉiuj sponsoroj estos gravuritaj sur aparta tabulo, fiksota sur la muro de la estonta konstruaĵo ĉe la ĉefa enirejo.

La sponsoraj sumoj estas pageblaj al kontoj de UZE, kaj pri ĉiuj detaloj oni povas anticipe konsultiĝi kun la respondeculoj de UZE: **radenko.milosevic@zg.htnet.hr** aŭ **josip.pleadin@kc.htnet.hr**



KIO ESTAS BRIKOJ?

"Brikoj" estas numerigitaj valorkuponoj, stampitaj de UZE, kiuj sur sia dorsa flanko portos informon pri la dato ĝis kiam ili estas uzeblaj por pagi la varojn kaj servojn de UZE, "Zagreba Esperantisto", Dokumenta Esperanto-Centro kaj eventualaj aliaj ofertantoj. Ĉiu "briko" valoras 1,00 eŭron, kaj ĝi estas uzebla ene de kvar jaroj. Se post tiu dato la kuponoj restas neeluzitaj, UZE konsideras, ke ili estas kontribuo por konstruigo de DEC-konstruaĵo. Per "briko"-kuponoj pageblas jarabono al nia revuo, aĉeteblos libroj aŭ pageblas servojn de DEC (kopiado, sendokostoj, loĝado en la Centro), sed ili estas ankaŭ donaceblaj al alia persono por samcela uzado. Se iu kolektas sufiĉan kvanton da kuponoj, eblas "ŝanĝi" ilin por sponsorco. Jen bona ekzemplo por societoj aŭ pli grandaj grupoj, kiuj povas organizi individuan "briko"-aĉetadon, kaj poste kiel organizaĵo fariĝi sponsoroj!

INICIATO PRI ESTABLO DE MECENATA FONDUSO

Neven Kovačić

Je diversaj okazoj mi kontribuis finance al variaj Esperantaj instancoj kaj individuoj en Belgio (Bruselo kaj Antverpeno), Pollando (Internacia studumo en Poznano), Nederlando (Societo Zamenhof) kaj Kroatio. Konkrete, en Kroatio; mi donacis 1.000 eŭrojn al Kroata Esperanto-Ligo por repago de la kredito prenita por aĉeto de la estonta sidejo de KEL en la strato de Valentin Vodnik en Zagreb. Krome, mi atribuis 500, respektive 300 eŭrojn al Studenta Esperanto-Klubo, okaze de la 50-jara fondiĝdatreveno. Interalie, mi donacis novan fridujon por la jam menciita loĝejo en Vodnikova 9 kaj finance ebligis partoprenon de tri zagrebaj esperantistoj en la Internacia Junulara Kongreso en Sarajevo. Do, variaj okazoj igis min agi mecenate je la propra nomo. Tio venigis min al konkludo, ke estus oportune senpersonigi la subtenadon de diversaj meritaj instancoj kaj individuoj aŭ/kaj valoraj por-Esperantaj aŭ per Esperantaj (laŭokazaj) agoj aŭ (konstantaj) agadoj unuflanke, kaj aliflanke, ŝajnis al mi same bone formaligi tiun agadon kaj doni al ĝi daŭran karakteron. Resume, tiuj premisoj nature gvidis al la ideo pri kreo de iu fonduso aŭ fondajo (temas pri sinonimoj en Esperanto; kroate: *zaklada* aŭ *fundacija*, kvankam en la kroata jura terminologio oni donis parte malsaman signifon al tiuj du originaj sinonimoj). Mi opinias, ke pro plene jura karaktero de tiu instanco kaj ĝia strikta perleĝa reguligo kaj perioda kontrolado de ĝia funkciado fare de la ŝtata direkcio (Državno ravnateljstvo za javnu upravu i lokalnu samoupravu), la fonduso donus pli bonajn perspektivojn por sia longdaŭra ekzisto. Konkreta establo de la fonduso estas precipe jura, teknika kaj financa demando pri kies solvado ni povus raporti en sekvaj numeroj de tiu ĉi revuo. Intertempe, ni povus demandi nin: Kion la estonta fonduso efektive faros?

Ni imagis du ĉefajn regulajn agadojn:

1. Atribuo de subvencio(j) "Kalendulo" - unufoje jare je la unua somera tago - hazarde mia naskiĝtago (la 21-an de junio),
2. Atribuo de premio(j) "Kalendulo" - same unufoje jare, la 15-an de decembro (Zamenhof-tago).

Ambaŭ subvencioj/premioj estos atribuataj en planita valoro de minimume 1.000 eŭroj.



La unua estas destinita ĉefe al promesplenaj agadoj kaj perspektivaj individuoj, kaj la dua al meritplenaj esperantistoj aŭ agadgrupoj, kluboj, societoj kaj simile.

Al tio nature aldoniĝas pure jura kaj administracia priservo de la fonduso laŭ la preskriboj de la kroata leĝo pri fondusoj kaj fondadoj (Zakon RH o zakladama i fundacijama, "Narodne novine" n-ro 36/95).

Krome, ĉar fonduso estas jura personeco de kapitalo kaj ne de personoj, necese ni devas prizorgi mastrumadon de la kapitalo, precipe konservon de la baza kapitalo (laŭ la leĝo temas pri minimume 50.000 kroataj kunaĵoj kio egalas al proksimume 7.000 eŭroj). Memevidente, la mastrumado devas celi ne nur konservon de la baza kapitalo, sed ankaŭ ĝian evoluon, nome la pligrandigon, aŭ per fruktigo de la baza kapitalo aŭ/kaj per akiro de novaj enspezoj.

Laste, sed ne lastsignife rilate al la fondusaj agadoj, ni ŝatus evoluigi aliajn, neregulajn agadojn. Unuavice, ni volus traduki aŭ tradukigi kaj mepublikigi aŭ publikigi ĉe aliaj, la kroatingvan version de la konata broŝuro de prestiĝa brita profesoro: "Ĉu nur angla Eŭropo?" Tio ĉi estas la kvintesenco de niaj planoj. Espereble, post kiam ni establos la fonduson kaj realigos la unuan ŝtupon, ni kapablos daŭrigi la liston de niaj projektoj, ĉar ni konceptas tion ĉi kiel vivolonĝan strebadon. Ni eĉ intime aspiras ke tiu ĉi futura kadro supervivunu nian biologian ekziston.

Survoje al realigo de la ideo pri kreo de la fonduso, ni organizis la kunvenon dum kiu ni detale priparolis esencon kaj celojn de stablo de la fonduso.

La kunveno okazis la 21-an de junio 2008, en la granda salono de Eŭropa domo (unua etaĝo, en Jurišić-strato 1, en Zagrebo). Ĝi okazis inter la 12h00 kaj 13h00 kun sufiĉe ampleksa diskuto kaj

La iniciatinto de la ideo pri fondo de la fonduso kaj granda mecenato de Esperanto Neven Kovačić en la fondkunveno de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj en 2007, en la momento kiam li subskribas sian aliĝilon.

partopreno de homoj el zagreba (Zagreb, Velika Gorica kaj Jastrebarsko) kaj rijeka (Rijeka kaj Opatija) regionoj kaj unu familio el Kroata Zagorje. La plejparto de la partoprenantoj estis esperantistoj.

Post saluta, enkonduka kaj klariga alparolo de la iniciatinto, disvolviĝis intense debato en kiu partoprenis interalie, la vicprezidanto de Kroata Esperanto-Ligo, s-ro Vjekoslav Morankić (kiu diligente ellaboris skriban projekton de statuto de la fonduso, pro kio mi ĉi-loke lin sincere dankas), s-ro Radenko Milošević, la prezidanto de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, s-ro Boris Di Costanzo, la Ĉefdelegito de UEA en Kroatio kaj reprezentanto de Rijeka Esperanto-Societo (kiu ankaŭ partoprenis la tutposttagmezan preparakunvenon en Rijeka la 12-an de junio ĉi-jare) kaj s-ino Spomenka Štimec, la sekretariino de KEL.

Entute, ĉiuj parolis en pozitiva tono, ĝenerale salutante la ideojn, sed ankaŭ reliefigante kelkajn utilajn konsiderojn kaj konsilojn, pri kiuj mi esprimas mian altan aprezon.

Nia renkontiĝo estis daŭrigita en amika etoso dum laŭokaza koktelo kaj lunĉo, al kio aldoniĝis pli poste agrabla, terasa, restoracia, naskiĝtaga kunmanĝo de la selektita grupo ĝis fino de la posttagmezo. Konklude, memorinda tago!

Ni esperas ke tiu ĉi estas nur unu el komencaj paŝoj survoje al konkretigo de la nobla ideo pri fondaĵo por subtenado de la Esperanto-kolektivo en Kroatio. Estu tiel!

Eventualajn ideojn, proponojn, komentojn, rimarkojn kaj kritikojn vi povas sendi al la iniciatinto: hautlescoeurs@skynet.be

CERBAJ IMPULSOJ

Dinko Matković

1. Pri la nudista plaĝo oni malplej rememoras la okul koloron de la nudistinoj.
2. Iuj virinoj similas al meteoro: ilia luma postsigno rapide malaperas.
3. Plej rapide oni lernas fremdan lingvon en lito kun eksterlandano.
4. En la varma sino infanoj kreskas kaj aĝuloj velkas.
5. Sen edzino vi ne estas edzo kaj kun edzino vi estas limigite libera homo.
6. En la komenco estis Adama vorto kaj Eva repliko.

ESPERANTO KAJ KROATA KULTURA IDENTECO

Filozofia fakultato de Universitato de Zagrebo

UNUA INFORMILO

Estimataj,
okaze de centjariĝo de la fondiĝo de Unuiĝo de kroataj esperantistoj, Filozofia fakultato de Universitato de Zagrebo kaj Kroata Esperanto-Ligo organizos vendredon kaj sabaton, la 7-an kaj 8-an de novembro 2008 sciancan kaj fakan simpozion ESPERANTO KAJ KROATA KULTURA IDENTECO. La organizantoj intencas kolekti prelegantojn kiuj prezentos rezultojn de siaj esploroj pri kvar temaroj:

1. lingvosciencaj, sociolingvistikaj kaj kulturaj aspektoj de Esperanto kiel nacie neŭtrala ilo por internacia komunikado,

2. historio de Esperanto en Kroatio,

3. rolo de Esperanto kiel pontolingvo

por prezentado de kroataj kulturaj atingajoj eksterlande,

4. agado de kroataj esperantistoj sur ne-esperantisma kampo.

Oficialaj lingvoj de la simpozio estos la kroata kaj Esperanto; Esperantlingvaj prelegoj de eksterlandaj partoprenantoj estos tradukataj simultane en la kroatan, dum kroataj partoprenantoj prelegos kroat- kaj/aŭ Esperantlingve. Kroataj partoprenantoj neparolantaj Esperanton sendu al la organizanto ĝis la 30a de septembro 2008 siajn kroatingvaj prelegmaterialojn (Power Point prezentajon, paperan materialon aŭ ion similan) por ebligi al la organizanto ĝustatempe prepari Esperantlingvan version de la prelegajo.

La kroat- kaj/aŭ Esperantlingvan resumon de la prelego (maksimume 1800 karakterojn, inkluzive interspacojn) oni sendu al la organizanto plej malfrue ĝis la 30a de septembro 2008 por ebligi ĝustatempan eldonon de la dulingva resumlibreto.

La prelegoj de la simpozio estos publikigitaj dulingve, en la kroata kaj en Esperanto, en simpozia libro eldonota ĉe la eldonejo de Filozofia fakultato en Zagrebo FF-Press. Pri la detaloj de tekstformatigo, citado kaj aliaj teknikajoj la partoprenantoj estos informitaj en la dua informilo. Unuopa prelego povas daŭri 20 minutojn kaj oni havos pliajn 10 minutojn por diskutado.

Organiza komitato de la simpozio konsistas el:

1. **d-ro Damir Boras**, vicdekano

por scienco kaj internaciaj rilatoj ĉe Filozofia fakultato en Zagrebo kaj estro de Katedro pri

leksikografio kaj enciklopediscienco ĉe Fako pri informsciencoj de Filozofia fakultato en Zagrebo – prezidanto de la Organiza komitato; 2. **magistro Radenko Milošević**, konsilisto kaj estro de Fako pri makroekonomiaj analizoj, bankoj kaj aliaj financinstitucioj ĉe Kroatia ekonomia ĉambro kaj kroata UEA-delegito pri ekonomia politiko kaj ekonometrio – kunordiganto de organizado kaj financioj; 3. **d-ro Velimir Piškorec**, eksterordinara profesoro ĉe la Katedro pri germana lingvo ĉe Filozofia fakultato en Zagrebo kaj kroata UEA-delegito pri lingvistiko – kunordiganto de la programo. **Sekretario** de la simpozio estos **Aleksandra Šukanec**, scienca novicino ĉe la Germana fako de Filozofia fakultato en Zagrebo.

Prezidanto de Respubliko Kroatio **Stipe Mešić** transprenis altan aŭspicion de la simpozio kaj la **Honora komitato** de la simpozio prezidas la fama kroata lingvisto **Dalibor Brozović**, membro de Honora Patrona Komitato de UEA.

Aliaj membroj de la Honora komitato de la simpozio estas: **d-ro Ivo Borovečki**, em. radiologo kaj Honora Komitato de UEA; **d-ro habil. Detlev Blanke**, prezidanto de Gesellschaft für Interlinguistik; **em. profesoro d-ro Ivan Golub**, teologo, sciencisto kaj verkisto; **profesoro d-ro Mislav Ježić**, membro de Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj, estro de Katedro pri hindologio kaj malproksimorientaj studoj, vicprezidanto de Internacia Paneŭropa Unio; **profesoro d-ro Miljenko Jurković**, arthistoriisto kaj dekano de Filozofia fakultato en Zagrebo; **em. profesoro d-ro August Kovačec**, lingvisto kaj latinidisto ĉe Latinida fako de Filozofia fakultato en Zagrebo kaj membro de Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj; **em. profesoro d-ro Josip Silić**, lingvisto ĉe Kroata fako de Filozofia fakultato en Zagrebo.

La aliĝilon por la simpozio (kun nomo kaj familia nomo, adreso, institucio, telefono kaj retpoŝta adreso) kaj la resumon de la prelego oni sendu poŝte aŭ retpoŝte plej malfrue ĝis la 30a de septembro 2008 al: **d-ro Velimir Piškorec, Odsjek za germanistiku, Filozofski fakultet, Ivana Lučića 3, HR-10000 Zagreb**
retadreso: vpiskor@ffzg.hr
telefono: 00385-98-48-11-37



KONFERENCO DE INTERLINGVISTOJ EN AMSTERDAMO

 Velimir Piškorec

La 17-an kaj 18-an de julio 2008 ĉe la Universitato de Amsterdamo, laŭ invito de d-ro Wim Jansen, docento pri interlingvistiko de la Lingvistika Fakoj de la Universitato, okazis Konferenco de Universitatoj kie Esperanto aŭ Interlingvistiko estas Instruata. Ĝi estis aranĝo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) kaj estis subvenciata de Esperantic Studies Foundation.

La konferenco traktis tri ĉefajn temojn:

(1) Studprogramoj.

Kiujn elementojn enhavu taŭgaj studprogramoj? Kiuj modeloj jam ekzistas? Kia materialo ekzistas – skribe, rete, alifforme? Kiel ligi la studprogramojn kun aliaj parencaj fakoj?

(2) Starigo de

programoj kaj administrado. Kiel konvinki sian universitatostarigan programon? Kiel kongruigi ĝin kun eksteraj postuloj (ekzemple la Bolonjaj interkonsentoj)? Kiel daŭrigi la programon? Kiel serĉi eksterajn financajn rimedojn?

(3) Interŝanĝoj kaj

kunlaboro. Kiel utiligi la rimedojn en aliaj universitatoj, inkluzive bibliotekajn kaj instruajn rimedojn? Kiel dividi la proprajn rimedojn kun aliaj universitatoj? Kiel interŝanĝi profesorojn kaj studentojn?

Enkondukan paroladon faris John Wells (Londona Universitato). Prelegis en la pleno kaj gvidis la koncernan laborgrupon la jenaj personoj: Wim Jansen (Amsterdama Universitato) pri studprogramoj, Sabine Fiedler (Universitato de Leipzig) pri starigo de programoj kaj administrado, kaj Ulrich Lins (germana interŝanĝa organizaĵo DAAD) pri interŝanĝoj. La konferencen partoprenis sume

48 personoj el 39 universitatoj, esplorinstitutoj k.s., el 23 landoj.

En sia fina sesio, ili ellaboris la jenajn konkludojn.

1. Ni utiligu la retejon *edukado.net*, kiel konvenan kolektojn de materialoj kaj interŝanĝejon de spertoj, ideoj, projektoj ktp. (Katalin Kováts, ĝia prizorganto, estas preta tion plenumi, se venos la necesa kunlaboro; tiu ĉi rekomendo rilatas ne nur al studprogramoj sed al la laboro de la konferenco ĝenerale).

2. Necesas fari inventaron (ekzemple ĉe *edukado.net*) de ekzistantaj materialoj (studprogramoj en unuopaj universitatoj, studmaterialo en formo de kurslibroj ktp.). Kelka materialo estis kolektita kunlige kun la nuna konferenco kaj troviĝas portempe ĉe la retejo de Esperantic Studies Foundation. Ĝin oni povus preferi transigi al *edukado.net*.

3. La admirindan laboron de Germain Pirlot (listigo de universitatoj kie Esperanto estas instruata) necesas daŭrigi, sed gravegas pli aktiva kunlaboro kun li (preferi kun plia detaligo de la programoj mem) kaj respondemo al liaj komunikoj. Jam komenciĝis kunlaboro inter *edukado.net* kaj G. Pirlot, cele al starigo de facile konsultebla listo en la reto.

4. Ekzistas eĉ kelkaj proponoj pri manlibro pri interlingvistiko, verkita en la angla (kiel la plej disvastiĝinta lingvo en la fako lingvistiko, sed kun la celo traduki ĝin en aliajn lingvojn kaj unuavice en Esperanton). Tiu manlibro povus havi plurajn formojn. Unu ebleco estus kvazaŭ antologio de unuopaj ĉapitroj pri interlingvistikrilataj demandoj (ne nur ekzemple komparaj studoj pri planlingvaj

projektoj, sed ankaŭ pri la rilato planlingvoj/lingvoplanado, pri la politikaj kaj sociaj kondiĉoj ĉirkaŭantaj planlingvojn, pri lingvekonomiko rilate kun planlingvoj, pri la rolo de planlingvoj en la intelekta historio ktp.). Tiaj antologioj ekzistas en la angla lingvo por pluraj parencaj fakoj (ekzemple tradukado de Venuti 2000, aplika lingvistiko de Kaplan 2002, socilingvistiko de Coulmas 1997, ktp.). Aliaj eblecoj inkluzivus ĝisdatigon kaj tradukon de ekzistantaj materialoj (ekzemple de Jansen aŭ Blanke aŭ Barandovska-Frank).

5. Similan bezonon oni sentas koncerne bone prezentitan libron pri Esperanto (iom simila al *La fenomeno Esperanto* de Auld, kvankam pli objektiva kaj scienca). Tia libro vere ne ekzistas en la angla lingvo, kaj tiu manko verŝajne malhelpas nian fakon ĉe lingvistoj. Estus bone se prestiĝa eldonejo povus eldoni tian libron en la angla kaj poste oni povus traduki ĝin en aliajn lingvojn. Hokan Lundberg jam elkizis eventualan enhavon de tia libro.

6. Ellaboro de studprogramoj por diversaj niveloj. Kvankam la situacio varias multe de unu universitata sistemo al alia (aŭ eĉ unu universitato al alia), estus bone havi je nia dispono plurajn modelojn de studprogramoj facile adapteblajn.

7. Someraj (aŭ similaj) sciencaj seminarioj kiuj estos agnoskitaj de la universitata medio. Oni pridiskutis diversajn formojn de tiaj altnivela malgrandaj seminarioj, taŭgaj por doktoraj studentoj kaj eventuale ankaŭ por novaj universitataj instruistoj. Universitata agnosko gravus.

➔ daŭrigo en la paĝo 108

INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTO EN UNIVERSITATO DE ZAGREBO

 **Velimir Piškorec**

Enkonduko

Universitato de Zagrebo estas la plej granda kaj tradicirika universitato en Kroatio kun pli ol 55 mil studentoj. Ĝi konsistas el tridek fakultatoj kaj tri akademioj pri artoj, el kiuj Filozofia fakultato kun siaj 25 fakoj estas unu el la plej grandaj unuoj de la Universitato kun ĉirkaŭ kvin mil studentoj. La plejmulto de studentoj ĉe Filozofia fakultato kombinas dum sia studado du studprogramojn. Ĉe la fakultato estos ofertitaj en la akademio jaro 2008/2009 eĉ 45 diversaj bakalaŭraj studprogramoj.

Dum la akademio jaro 2005/2006 okazis ampleksa kaj relative radika studreformo laŭ Bolonjaj interkonsentoj – por Filozofia fakultato tio praktike signifis, ke la ĝistiamaj kvarjaraj diplomaj studprogramoj estis anstataŭigitaj per dufazaj studprogramoj laŭ la modelo 3+2 aŭ escepte 4+1. Kutime la unua studperiodo ofertas ĝeneralajn konojn pri iu studobjekto kaj la dua specialiĝon kadre de la sama studobjekto. Ekzemple, la studentoj de germanaj studoj povas en sia dua, diploma studperiodo specialiĝi pri interkulturaj germanaj studoj, instruado de la germana aŭ tradukado kaj interpretado. En la akademio jaro 2008/2009 komenciĝos la dua studperiodo laŭ tiu principo. Do, inter 2005 kaj 2008 paralele ekzistis du

studsystemoj – la nereformita kaj la reformita. Ekde 2008/2009 ekzistos nur unu, la reformita studsystemo.

Seminario pri eko- kaj interlingvistiko en 2007/2008

Laŭ la malnova studprogramo ĉiu studento de germanaj studoj devis en sia kvara studjaro enskribiĝi al unu lingvistika seminario. La oferto de seminarioj variis de jaro al jaro depende de la nombro de docentoj – kutime oni ofertis tri aŭ kvar seminariojn. Sed en la akademio jaro 2007/2008 la oferto de seminarioj estis pli riĉa, ĉar la Germana fakolicevis junajn geasistantojn (nomatajn en Kroatio sciencaj novicoj), al kiuj oni transdonis la pli ĝeneralajn kaj enkondukajn studobjektojn pli frue instruitajn de pli maljunaj docentoj. Tiuj, inverse, kiel pli spertaj, povis dediĉi sin al ellaborado de specifaj seminarioj korespondantaj al siaj fakaj intereso.

Ĉar mi mem intertempe apartenas al pli maljunaj kunlaborantoj – kvankam la plej juna el ili – mi ricevis la eblecon gvidi eĉ du seminariojn. La seminarion pri lingvaj kontaktoj – ĝenerala teorio de lingvaj kontaktoj kaj german-kroataj lingvaj kaj kulturaj kontaktoj – mi jam ofertis dum kelkaj jaroj, sed oni petis min proponi ankaŭ iun ĝis tiam ne pritraktitan lingvistikan temaron.

Informiĝinta pri faka literaturo pri ekolingvistiko kaj antaŭ kelkaj jaroj kroatiginta du ĉapitrojn el la germana enkonduko al ekolingvistiko de aŭstra lingvisto Alwin Fill, mi supozis, ke tiu lingvistika disciplino estus oportuna kaj interesveka por miaj studentoj. Ekolingvistoj interalie pritraktas lingvan diversecon kaj aktive klerigaĵas pri la bezono aktive protekti tiun diversecon. Aliflanke oni ankaŭ atentigas pri dominado de "grandaj" lingvoj kiuj "manĝacas" malgrandajn lingvojn kaj pri la el tio rezultinta lingva malegaleco kadre de internacia komunikado.

En tiu punkto mi vidis ligilon al interlingvistiko, kiu el la perspektivo de neŭtrala internacia komunikado pritraktas pli-malpli similajn temojn. Nature kaj logike sekvis la ideo, ke por miaj studentoj estu bone konatigi ilin kun jam 120 jarojn funkcia Esperanto.

Nun mi skizu la lingvan profilon de miaj studentoj: preskaŭ ĉiuj el ili jam bone parolis la germanan kaj kutime la anglan. Krome, plejmulto el ili lernis en gimnazio la latinan kiel devigan fakon. Estis jam dirite, ke en Filozofia fakultato kutime oni studas du fakojn – plej ofte du fremdlingvojn, sed ankaŭ unu fremdlingvon kombinitan kun humanismaj fakoj kiel historio, sociologio, pedagogio, etnologio, antropologio aŭ arkeologio. Tio konkrete signifas, ke miaj seminarianoj krom la gepatra kroata lingvo, la germana kaj

➔ daŭrigo el la paĝo 107

8. Kolektu diplom-laboraĵojn (daŭrigu kaj profundigu la laboron de E. Symoens). Siatempe E. Symoens kolektis detalojn pri (laŭ sia

ebl) ĉiuj disertacioj kiuj rilatas al Esperanto kaj interlingvistiko, kaj aperigis volumon kaj suplementon kie ili estis listigitaj. Necesas restarigi tiun laboron, ekzemple pere de rete alirebla listo (ĉe edukado.net?).

9. Estas proponite, ke la venonta ILEI-konferenco (Krakovo, Pollando, 18-25 julio 2009) traktu interalie universitatan kunlaboron, kaj do iel daŭrigu la starigitan dialogon.



la angla scipovis ankaŭ aliajn lingvojn: la latinan, la italan, la francan, la hispanan, la rusan kaj la slovenan. Do, miaj studentoj jam estis plurlingvanoj kiam ili komencis lerni Esperanton.

La antaŭscio de aliaj lingvoj ĉe miaj studentoj estis bonega bazo por kompara instrualiro rilate al etimologio de Esperanta vortrezoro, sed ankaŭ al gramatiko. La ĉefa lernolibro uzata en la seminario estis la germanlingva eldono de la lernolibro kompilita surbaze de Zagreba Metodo (germanlingva, ĉar en la Germana fakolo de Filozofia fakultato oni tradicie uzas la germanan kiel instrulingvon!). Uzataj estis ankaŭ ĉapitroj kaj ekzercoj el aliaj Esperanto-lernolibroj por plivastigado de vortrezoro kaj gramatika ekzerco.

Mi koncentriĝis al instruado de Esperanto kaj ne al teoriomado pri interlingvistiko precipe pro la fakto, ke jam en aŭtuno 2007 mi sciis, ke ĝeneralaj interlingvistikaj temoj por miaj seminarianoj estos pritraktataj de mondfama interlingvisto Detlev Blanke dum lia gastado en Filozofia fakultato en majo 2008.

Nome, dum mia renkontigo kun Detlev Blanke en novembro 2007 mi informis lin pri mia intenco instrui interlingvistikon kaj Esperanton demandante lin ĉu li volus gastari en mia seminario pri eko- kaj interlingvistiko kaj paroli pri teorio kaj historio de planlingvoj kaj interlingvistiko. Li subtenis mian ideon kaj esprimis sian pretecon veni al Zagrebo. Do, mi decidis ne pritrakti mem tiujn temojn kiuj poste devis esti prezentotaj de li.

La sukcesplena gastado de Detlev Blanke estis okazigita en majo 2008. Jen Esperantigitaj titoloj de liaj prelegoj en la germana: 1. Interlingvistiko – objekto kaj aktuala pozicio en la lingvoscienco, 2. Internaciaj planlingvoj – karakterizo kaj tipologio, 3. Vortfarado en Esperanto kaj la germana – kontrastive, kaj 4. Esperanto

– internacia socilingvistika eksperimento. Kiel el projekto fariĝis lingvo (La detalan raporton pri tiu gastado vidu en "Zagreba Esperantisto", 3/2008).

En mia seminario pri eko- kaj interlingvistiko gastis komence de majo 2008 ankaŭ anoj de zagreba Studenta Esperanto-Klubo kiuj parolis al miaj studentoj pri siaj aktivecoj kaj eblecoj kiujn ofertas Esperanto por gejunuloj. La gastadoj de sinjoro Blanke kaj junaj zagrebaj esperantistoj ebligis al mi koncentriĝi al instruado de Esperanto kombinita kun seninterrompa diskutado pri etimologiaj aspektoj de Esperanto. Krome, la studentoj atingis ankaŭ bazajn konojn de Esperanto-gramatiko. Al instruado de Esperanto estis dediĉitaj entute sep instrusesioj de la du-semestra seminario en aprilo kaj majo – nun mi iomete bedaŭras, ke mi ne reduktis teoriomadon pri ekolingvistiko al kosto de Esperanto-instruado, ĉar la studentoj montris grandan entuziasmon lernante Esperanton. Eĉ la fakto, ke la seminario okazadis lundon je la 8h00 ne malhelpis al ili partopreni relative multnombro. La Esperanto-instruadon ĉeestis kutime dek ĝis dekkvin studentoj.

La pozitivan reagon al Esperanto-instruado montras ankaŭ la fakto, ke tri seminarianoj kaj unu asistantino volis ankaŭ post la fino de prelegperiodo komence de 2008 daŭrigi la lernadon de Esperanto. Mi tre ekĝojis pro ilia entuziasmo kaj lernopreteco kaj ni regule renkontiĝis dum junio en mia oficejo unu fojon semajne po 90 minutoj. Ili esprimis deziron ankaŭ dum la sekvonta akademia jaro daŭrigi la lernadon. Kvankam tio estas aldona senpaga devigo por mi, mi esperas ke mi sukcesos inkludi tiun kurson en mian laborprogramon.

Priskribante la seminarion kaj la respektivan organizon kadron, mi devas ankaŭ mencii vere tre gravan

fakton, ke la de mi proponita temaro por la seminario estis varme apogita de la estrino de Katedro por germana lingvo, profesorino d-rino Zrinjka Glovacki-Bernardi, kiu kiel homo kaj kiel fakulino estas tre malferma por novaj ideoj. Ŝi mem estas elstara kroata lingvistino kiu okupiĝas pri tekstolingvistiko, sociolingvistiko kaj lingvofilozofio. Pli frue, eĉ antaŭ nur kelkaj jaroj estus tute nekredible ke oni ofertu al studentoj de germanaj studoj pritrakti iun ajn temaron kiu ne rilatas rekte al la germana.

Seminarioj pri interlingvistiko kadre de reformitaj studprogramoj en 2008/2009

La faka malfermeco kaj preteco de profesorino Glovacki-Bernardi apogi interlingvistikon kiel studobjekton kaj min kiel sian kunlaboranton, denove montriĝis komence de junio 2008, kiam Germana fakolo – same kiel ĉiuj aliaj fakoloj en Filozofia fakultato – rajtis modifi sian reformitan studprogramon ĝis 20%. Dum niaj diskutoj pri eblaj modifoj, mi – rememorigante la gekolegojn pri bona reago de niaj studentoj al Esperanto-instruado kaj interlingvistikaj temoj prezentitaj dum la sukcesplenaj prelegoj de Detlev Blanke – proponis unusemetran elekteblan studobjekton por studentoj de germanaj studoj nomitan *Plansprachen* kaj sian strukturitan, kroatlingvan studobjekton sub la titolo *Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto*, elekteblan de ĉiuj studentoj de Filozofia fakultato. Ambaŭ fakoloj estus partopreneblaj de tiel nomataj antaŭdiplomaj, bakalaŭraj studentoj kadre de la studprogramoj reformitaj laŭ Bolonjaj interkonsentoj. Do, mia propono por instrui tiujn du studobjektojn estis jam formale akceptita de profesorino

Glovacki-Bernardi kiel estrino de Katedro pri germana lingvo kaj ankaŭ dum la sesio de Germana fako. La 2-an de julio 2008 ĝi estis pridiskutita kaj akceptita dum la sesio de senato de Filozofia fakultato, dediĉita al proponoj por modifoj de la ekzistantaj studprogramoj.

Jen la Esperantigita priskribo de la enhavo de interlingvistika seminario:

La nomo de studobjekto:

Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto

Docento: Dr. sc. Velimir Piškorec, eksterordinara profesoro

Punktoj: 3

Lingvo: la kroata

Daŭro: unu semestro

Statuso de la studobjekto:

elektebla por ĉiuj studentoj de Filozofia fakultato

Formo de instruado: 1

horo por prelego kaj 1 horo por ekzercoj

Antaŭkondiĉoj por

partopreni: la studentoj devas esti enkribitaj en iu ajn bakalaŭra studprogramo ĉe Filozofia fakultato

Celo: akiro de scioj

pri ĝeneralaj principoj de interlingvistiko kiel scienco pri planlingvoj kaj de historio de planlingvoj, iliaj sistem-lingvistikaj aspektoj; akiro de bazaj konoj de strukturoj kaj elementoj de Esperanto kaj de baza komunika kompetenteco en Esperanto

Metodoj: fronta instruado, grupa kaj individua plenumado de taskoj

Enhavo: Kadre de la studobjekto pritraktotaj estos diversaj aspektoj de planlingvoj kiel specifaj lingvosistemoj konstruitaj precipe por neŭtrala internacia komunikado.

Diskutotaj estos klasifikoj de planlingvoj depende de ilia funkcio (filozofiaj lingvoj kaj tiuj por parola kaj skriba komunikado), lingva materialo el kiu ili konsistas (aprioraj kaj aposterioraj lingvoj) kaj rilate al la demando ĉu tiu materialo estis elprenita el unu aŭ pluraj

lingvoj. Presentotaj estos ankaŭ diversaj socikulturaj kunteksto en kies kadro unuopaj planlingvoj aŭ planlingvaj projektoj estis konstruitaj. Oni analizos ankaŭ kriteriojn aplikitajn de unuopaj aŭtoroj de planlingvoj kaj motivojn laŭ kiuj ili orientiĝis. Skizotaj estos ĉefaj trajtoj de internacie uzitaj kaj uzataj planlingvoj (Volapuko, Esperanto, Ido) kaj de tiuj kies aŭtoroj devenas el Kroatio (Juraj Križanić: Ruski jezik, Juraj Bauer: Spelin).

Speciale fokusota estos Esperanto kiel la plej sukcesinta planlingvo en la historio de la homaro, kiun karakterizas specifa lingva komunumo, 120-jara tradicio de uzado,

plurfunkcieco kaj ampleksa korpuso de ĝeneralaj, literaturaj kaj fakaj tekstoj. Rilate tiun fakton, oni detale pritraktos gramatikajn, vortfaradajn kaj leksiko-semantikajn aspektojn de Esperanto. La ĉefa metodo estos kompara analizo de tiuj aspektoj kun lingvaj strukturoj kaj elementoj de lingvoj parolataj de seminarianoj, precipe de la gepatra kroata lingvo, sed ankaŭ de lingvoj uzataj en kroatia kultura kaj kleriga kunteksto, ekzemple la angla, la germana, la franca, la itala kaj la latina.

Devoj de studentoj:

regula ĉeestado, skriba ekzameno meze de semestro kaj parola ekzameno fine de semestro.

KIAM MI ESTIS LA PLEJ FELIĈA EN LA VIVO?

 *Mirjana Žeželj*

La samnoma libro kun nigra kovrilo kaj ruĝa koro frontpaĝe, redaktorita de Julia Sigmond, redaktorino de la rumania gazeto "Bazaro" enhavas 104 rakontetojn publikitaj en tiu gazeto. Inter tiom da mallongaj rakontoj pri feliĉo, estas escepte multaj verkitaj de kroataj esperantistoj.

Jen kelkaj interesaj pensoj pri la feliĉo, legataj sur paĝoj de tiu interesa libreto.

"La feliĉo estas anima stato kiam oni estas en plena harmonio kun si kaj sia ĉirkaŭaĵo." La feliĉo ne estas pinto de la monto, la feliĉo estas ĉiu farita paŝo je la vojo supren. Ne estas ĉiam facile sed post ĉiu solvo de la problemoj, post ĉiu trapaso de la obstakloj, post ĉiu venko de niaj malfortoj ni sentas nin fieraj, ĝojaj, kontentaj kaj feliĉaj. Brila rideto tiam lumigas niajn vizaĝojn.

La feliĉsento iĝas pro la naskiĝoj de niaj infanoj aŭ nepoj – sanaj, aŭ malsanaj kaj iliaj sukcesaj resaniĝoj; pro la vivpliboniĝoj de ĉiu membro de la homaro; pro la kompanio de niaj sinceraj amikoj, pro la agrablaj kaj pliriĉigaj okazaĵoj; bela naturo, bona libro, ŝatata muziko, religiozaj kaj patriotaj sentoj, interesaj vojaĝoj, sukceso el ĉiu grado de nia lernado, el bonaj postenoj!

La feliĉsento iĝas el niaj enamiĝoj – unuaj kaj postaj; el la unua kaŝita amrigardo; pro la povo feliĉiĝi aliajn!

Memoro pri la feliĉo estas ankaŭ feliĉo.

Fakte, ĉiu momento, ĉiu afero povas nin feliĉigi en iu periodo de la vivo. Necesas nur diversaj specoj de amo, tiuj ĉi gardataj kaj flegataj en la koro sur la kovrilo de la libro.

Ankaŭ la libro donacita al mi de la kompilantino tre feliĉigis min!

La feliĉo estas unika afero kiu estante dividata multobliĝas!

ĈU IO NOVA EN LA ESPERANTA FABELOLANDO? Raita Pyhälä

En la jaroj 2000, 2001 kaj 2002 kroata knabineto Stefani Strunjak partoprenis la Internacian Fabelkonkurson, ĉiam gajnante premiojn. En la unua fojo ŝi ĉeestis la premiofeston (18-an de oktobro) en Finnlando kun sia instruistino Judita Rey-Hudeček. La etoso estis korvarma kaj entuziasma, malgraŭ malvarma malseka neĝado, vetero kutima en la nordo oktobre. "La konkurso efike kontribuas al la informado pri Esperanto", poste diris sro Osmo Buller, kiu ankaŭ ĉeestis.

La konkurso daŭras jam de 8 jaroj. Ĝin okazigas literatura Pääntalo-instituto, kies celo estas instigi homojn al verkado helpante ilin al lingva evoluo kaj esprimado de sentoj kaj spertoj, ne nur plenkreskulojn sed ankaŭ infanojn, kiuj povas partopreni en la lingvoj finna, samea kaj Esperanta. La konkurson iniciatis s-ino Aini Vääräniemi, fervora esperantistino. Ŝi ankaŭ dediĉis parton de sia heredita arbaro al la iniciatinto de Esperanto.

"La Arbaro de Zamenhof", kie pendas ĉe arbotrunkoj tajpitaj fabeletoj sub travidebla kovraĵo en simplaj grizaj lignokadroj, enhavas verkajetojn ankaŭ de Stefani. En 2007-2008 lokaj lernejoj desegnis bildojn pri la fabeltemoj, kaj oni klopodas por eldoni dulingvan libron (Esperanta-finnä) el premiitaj konkursaĵoj.

En la Arbaro pendas aldone ŝildoj montrantaj piceojn reprezentantajn la 18 landojn, el kiuj jam venis vizitantoj. Ĉiu unua gasto rajtas elekti arbon por sia lando. Aliaj ŝildoj memorigas la vizitantojn pri noblaj idealoj, kiaj ekzemple Amikeco, Paco, Egaleco, Homaj Rajtoj, aŭ pri organizaĵoj, kiaj UEA, Esperanto-Asocio de Finnlando, skoltjoj. Ĉiujare lokaj lernejoj en sia kvina lernojarlo vizitas la Zamenhof-Arbaron kaj sciigas pri

Esperanto. En printempo 2008 okazis 230 tiaj vizitoj, dum kiuj la geknaboj ofte kantas Esperante, lernas kelkajn Esperanto-vortojn pentritajn sur ŝildoj apud aŭ sur objektoj kaj statuetoj, kiaj aglo, leporo, heliko, pego, ŝtono kaj aliaj. La vizitantoj eniras la etoson de la samtempe solena kaj amuza Esperantejo laŭ softa pado inter arbegoj ĉiam verdaj. La ĝermo Esperanta elkresku kaj plifortigu helpe de tiu ĉi unika ejo.

Pliaj informoj pri la verkisto Pääntalo kaj tekstoj de la premiitaj fabeloj legeblas ĉe:
<http://www2.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/>



Fotoj: Stephanie Strunjak kiam ŝi partoprenis la fabelo-konkursojn (supre), Aini Vääräniemi kun sia filino kaj erinaco (malsupre maldekstre) kaj ŝia muzeo (malsupre dekstre).



MALLONGA RAPORTO EL BANJA LUKA

Miĉo Vrhovac

En Banja Luka (Bosnio kaj Hercegovino) la 5-an de aŭgusto Esperanto-societo "La Mondo" organizis prelegon "Brilo kaj mizero de Kubo". La preleganto estis konata esperantisto kaj mondvojaĝanto Roberto Pontnau el Francio. Li estis en Kubo en 2007 kaj en sia prelego li parolis pri ordinaraj aferoj kaj ĝenerale pri vivo en tiu malproksima lando. La prelegon vizitis ĉirkaŭ 30 esperantistoj kaj neesperantistoj kaj post la fino de la prelego ili starigis demandojn al al preleganto. Post la prelego estis organizita modesta koktelo dum kiu ĉiuj vigle babilis. S-ro Roberto lernas la serban lingvon kaj kun neesperantistoj li interparolis en ĝi.

Roberto kaj du esperantistinoj el Banja Luka kune per lia aŭtomobilo poste vojaĝis al SAT-kongreso en Kazanlak (Bulgario). Post la kongreso en Bulgario s-ro Roberto denove havis prelegon pri nova Rusio. Pri la unua prelego raportis du tagojn poste la ĵurnalisto kaj esperantisto Miĉo Vrhovac en "Sendependa gazeto" (tre populara gazeto en Bosnio).

Esperantistoj en Banja Luka de la 30-a de aŭgusto ĝis la 6-a de septembro estis teknikaj organizantoj de ProvSUS de AIS el San Marino. Ĝi estis la unua studenta sesio de AIS an Bosnio kaj Hercegovino.

KOMENCIĜAS KUNLABORO INTER SPLIT KAJ ZAGREBO

Davor Grgat

Okaze de la 100-jariĝo de la enlanda movado, kaj samtiel longa agado de esperantistoj, la vicprezidanto de Esperanto-societo "Split" Davor Grgat, en sia hejmo en Dugi Rat gastigis la 10-an de julio la vicprezidanton de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, respektive redaktoron de "Zagreba Esperantisto" Josip Pleadin. Estis preparolita la riĉa historio de Esperanto-movado en Dalmatio, kiu dum la lastaj jaroj konsiderinde stagnas. Estis konstatite, ke necesas fari paŝojn por efika informado pri Esperanto. Estas konate, ke en Split okazis en la jaro 1924 la 2-a Sudslava Esperanto-kongreso, kaj en 1959 en la splita ŝipfarejo estis konstruata transoceana ŝipo "Zamenhof". Jaron poste okazis en Split Tria kultura festivalo kaj la urbo donis du internacie gravajn esperantistojn: Ivo Lapenna, multjaran prezidanton de UEA kaj Ivo Osibov, sekretarion de tiu plej multnombra Esperanto-organizaĵo. Dum la vesperaj horoj la gastiganto kaj lia gasto vizitis en Kaŝtel Novi la societan prezidanton, s-ron Anđelko Drnasin, kiun ili informis pri la ĵurnalista kongreso en Litovio, kiun ili ambaŭ partoprenis, kaj pri la UK okazonta en Roterdamo. Drnasin dankis al la gasto, kaj konstatis ke nepre oni devas fari pli grandan reklamadon de Esperanto kaj okazigon de kursoj en Split, kiel en lernejoj samtiel ankaŭ en la societejo, pri kio la gasto promesis senrezervan helpon. Pri la rezultoj de la vizito estis informita la estraro de Esperanto-societo "Split" dum sia kunveno. La unuaj rezultoj de la planita kunlaboro devus montriĝi jam ĉi-aŭtune.

TELEGRAFE

En la retejo www.gazetejo.org baldaŭ estos elŝuteblaj ankaŭ la unuaj du numeroj de "Zagreba Esperantisto" el la kuranta jaro.

Komence de septembro, dank' al plena engaĝiĝo de Mato Ŝpekuljak, ekfunkciis renovigita kaj riĉigita kompleksa portalo www.zagreba-esperantisto.hr. Bonvolu frandi ĝin!

Preparata estas libroforma eldono de la prelego "Pensoj pri artefarita monda lingvo" de Tomislav Maretić, legita en Jugoslavia Akademio en 1891. La verkon dulingve eldonos Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj. La tradukon, enkondukon kaj komenton preparas Nikola Rašić.

Renkontiĝo en la bieno de Zlata Nanić en Habjanovac okazos la 28-an de septembro. Aliĝu ĉe: zlata.nanic@zg.htnet.hr

Esperanto-societo "Liberiga Stelo" ricevis urban subvencion por eldoni unu numeron de propra gazeto, kiu aperos kiel aldono al "Tempo", la oficiala gazeto de Kroata Esperanto-Ligo KEL sub la titolo "Osijeka Sonorilo".

Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto kaj "Grafokom" intencas eldoni la konatan lernolibron de Stano Marček "Esperanto-rekta metodo" en la kroata. Principa interkosnento inter la posedanto de kopirajto kaj kroataj eldonistoj estas akirita, kaj UPE sendis sian peton al kroata Minsiterio pri scienco, klerigo kaj sporto por financi la projekton, kiu, laŭ la konstato de UPE konvenas por elementlernejoj.

ESPERANTA TRADUKO DE “ONKLO MAROJE” EN PRESTIĜA ELDONO

 Redakcia kompilo



London, la 21-an de julio, la urbestrino de Dubrovnik **Dubravka Ŝuica**, akceptis la prezidantinon de la dubrovnika filio de *Matica Hrvatska*, **Ivana Burdelez**, la direktoron de *Dubrovnikaj Someraj Ludoj Ivica Prlender* kaj akademianon **Luko Paljetak**, okaze de la apero de la prestiĝa libro “Dundo Maroje” (“Onklo Maroje”). La libron de fama dubrovnika komediografo Marin Držić redaktis Luko Paljetak okaze de la 500-jara datreveno de lia naskiĝo. La libro enhavas tradukoj de la fama komedio en 18 lingvojn, inter kiuj troviĝas ankaŭ Esperanto. La redaktinto diris: “Per tradukado al 18 lingvoj mi deziris, ke tiu grandioza verko de Marin Držić venu al kiel eble pli da manoj en la mondo, por ke la legantoj konatiĝu kun la verko de unu el la plej grandaj kroataj kaj eŭropaj dramverkistoj, komediografoj kaj intelektuloj siatempe”. La eldonon entreprenis la dubrovnika filio de *Matica Hrvatska* kaj *Dubrovnikaj Someraj*

Maldekstre: La impona kaj prestiĝa eldono de “Onklo Maroje”

Ludoj, kaj la projekto komenciĝis antaŭ tri jaroj. La vrko estis presita en 1000 ekzempleroj sur impona nombro de 1679 paĝoj.

Pri la evento raportis pluraj gazetoj kaj interretaj portaloj en Kroatio kaj Montenegro. La taggazeto “Slobodna Dalmacija” skribis interalie: “La verkoj de Držić en fremdaj lingvoj ekzistas - nenie. En la librovendejo en Stradun (ĉefa strato de Dubrovnik, *rim. de la red.*), ekzistas eĉ ne unu komedio de Držić en la angla, germana, franca aŭ iu alia lingvo, kun escepto de granda libro en kiu “Onklo Maroje” estis presita eĉ en 18 lingvoj. Pri tiu libro, tamen, malmultaj interesiĝas, ĉar ĝi kostas 500 kunaojn (proksimume 70 eŭrojn, *rim. de la red.*)”. La zagreba taggazeto “Vjesnik en sia teksto mencias:

“En la kolektitaj tradukoj, respesuliĝas la kompleksa homa universo de la plej ofte ludata komedio de Držić, eĉ en 18 lingvoj, inter kiuj estas ankaŭ Esperanto.”

Pluraj ĵurnalistoj, kopiante la informon, konstatis, ke la verko estas tradukita al “18 eŭropaj lingvoj”, kio estas korektenda fakto, ĉar Esperanto ne estas nur eŭropa lingvo. Menciindas ankaŭ, ke la publikigo de la Esperanta versio en tiel prestiĝa eldono, kiu ja ne estas eldono por simpla, sed kompleksa libro por rafinita leganto, estas grava publika rekono al la lingvo de Zamenhof. La tradukon kompetente faris Lucija Borčić. Konatas la fakto, ke fragmente la sama verko aperis sub la titolo “Onklo Maroje” antaŭ duonjarcento (en “La Suda Stelo” 3/1957), traduke de Josip Velebit. Ekzistis ankaŭ kompleta traduko ludita de Internacia Arta Teatro en la Universala Kongreso en Harrogate (1961), sed nuntempa teksto ne troveblas.



Oficiala akcepto ĉe la urbestrino de Dubrovnik

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN ĈEFURBO DE ESPERANTUJO

Davor Grgat

Kun partopreno de 1845 geesperantistj el 73 landoj de la mondo, inter kiuj estis ankaŭ 36 esperantistoj el Kroatio, en Roterdamo (Nederlando) okazis inter la 19-a kaj 26-a de julio la 93-a Universala Kongreso de Esperanto, la plej grava kaj la plej signifa manifestacio de UEA, la organizaĵo kiu ĉi-jare festas sian 100-jariĝon.

En la solena inaŭguro oni legis salutmesaĝojn de Ivo Opstelten, la urbestro de Roterdamo kaj de la Alta Protektanto Gerdi A. Verbeet, prezidantino de la Dua Ĉambro de la Regna Delegitaro. Al la inaŭguro ĉeestis ambasadoro Frane Krnić kaj Konsilisto Mirjana Stančić el la kroata ambasado. Post legado de la salutdeklaro de la lokaj aŭtoritatoj, inter kiuj telegramo de la reĝa familio, vicprezidanto Ranieri Clerici legis tre varman mesaĝon de la ĝenerala direktoro de

Unesko s-ro Koichiroo Matsuura, kiu, sbstrekinte la manieron en kiu Esperanto estas tre ligita al la ĉiama laboro de Unesko pri defendo de kultura plualeco kaj pri subteno al la patrinaj lingvoj, finis per rekonio ke "kongrue kun la senĉesaj klopodoj faritaj de ĉiuj esperantistoj en la mondo tra la lastaj jardekoj, la 93-a Universala Kognreso de Esperanto reprezentas unikan kontribuon al la afero de lingva diverseco." Kongresa temo: "Lingvoj, trezoro de la homaro" estis tiom interesa, ke preskaŭ ĉiuj kongresanoj okupiĝis pri ĝi, kaj eĉ la Kongresa rezolucio reemfazas la neceson doni egalan respekton al ĉiu lingvo, al kulturo kaj al ĉiu homo en la mondo.

Ankaŭ kroatio prezentigis dum la kongreso. Nome, ĉe la komuna stando estis prezentita abunda reklamaterialo. Spomenka Štimec prezentis Kroatan

Esperanto-Ligon ĉe literatura kunveno, inĝeniero Radenko Milošević kaj Josip Pleadin kaj pluraj aliaj deĵorantoj disdonis prospektojn en la komuna stando, kie estis ricevitaj multaj laŭdaj vortoj de legantoj pri la gazeto "Zagreba Esperantisto". La kunvenon de TEĴA, partoprenis Vladimir Jurković, Radenko Milošević, Tomislav Radić kaj Davor Grgat, kiuj subskribis aliĝilojn por membreco en TEĴA. Komprenoble, ke ankaŭ aliaj kroatoj aktive partoprenis la kongreson, sed, permesu, ke pri tiu temo skribu iu alia.

Ekster la riĉa kulturarta programo dumkongrese, la kroataj esperantistoj ekskursis kaj trarigardis valorajn kulturhistoriajn vidindaĵojn de Roterdamo kaj la gastiganta lando (Hago - Madurodam kaj Scheveningen; Amsterdamo - Muzeo de Anne Frank, Muzeo de Van Gogh ktp.).

STANDOJ EN LA UNIVERSALA KONGRESO



Per du standoj Kroatio estis reprezentita en la 93-a Universala Kognreso de Esperanto en Roterdamo. La unua estis la stando en la Movada Foiro, arango kiu tradicie okazas en la unua kongresa tago.

Aparte estis luita stando "Kroatio" por la tuta kongresa semajno. La standon iniciatis Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, kaj kune financis: UZE, Kroata Esperanto-Ligo, "Grafokom", "Orbis Pictus" kaj Zlata Nanić. En la stando alterne deĵoris membroj de la karavano de "Orbis Pictus" kaj UZE disdonis ĉirkaŭ 1500 prospektojn pri siaj projektoj: "Zagreba Esperatisto" kaj "Dokumenta Esperanto-Centro". La foto prezentas la standon kun la deĵorantoj Radenko Milošević kaj Marija Jerković.

ESPERANTAJ ĴURNALISTOJ DUMKONGRESE

Dum la Unua Tutmonda kongreso de esperantistoj ĵurnalistoj okazinta en Vilnius, estis faritaj preparlaboroj por Fondkunveno de novregistrita TEĴA, kiu okazis la 21-an kaj 22-an de julio dum la Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo. La fondkunvenon de TEĴA partoprenis trideko da membroj, inter kiuj tri kroatoj: Vlado Ĵurković, Radenko Milošević kaj Davor Grgat. La kunvenon gvidis la prezidanto de TEĴA Audrys Antanaitis kaj la sekretario Vytautas Šilas, kiu proponis la Statuton kaj la Reglamenton de la organizajo. Kvankam iuj ĉeestintoj proponis ne tuj voĉdoni pri tiuj du dokumentoj, sed prokrastitajn por kelkaj monatoj, la prezidantaro de la kunveno asertis, ke la UK estas la plej bona okazo por voĉdonado,

ĉar ĝin partoprenas pli multe da membroj ol iun ajn alian aranĝon, kaj atendi la venontan UK-on ne eblas. Estis videbla granda intereso pri la Ĵarkunveno kaj multaj ĉeestintoj diskutis kaj donis interesajn proponoj, pri kiuj la estraro decidis. Vytautas Šilas, post mia demando jene taksis la kunvenon: "La kunvenon partoprenis preskaŭ ĉiuj registritaj anoj, nur malmultaj forestis. Tio gravas, ĉar ekde nun ni paŝas sur pli alta, solida agadbazo. Nome, ni akceptis novan Statuton de TEĴA, kio permesos al ni registriĝi kiel internacia jura persono kaj sekve kunlabori kun diversaj organizajoj senpere. Alia afero estas, ke preskaŭ ĉiuj membroj havas interretan konekton, pro kio ni simple povas, se bezonate, tuj al ĉiuj dissendi la saman informon, aŭ ili povas viziti nian

 **Davor Grgat**

retpaĝon www.tejha.org. Ĉe la kunvenon ni faris kompletigojn de nia Estraro, nome, ni elektis ankoraŭ unu personon, kaj nun ni estas sepopo. Elektita estis Gabriela Kosiarska, laboranta ĉe Pola Radio, juna kaj sperta esperantistino. Ĝuste ŝi reprezentos nin en la organiza komitato de sekva Universala Kongreso. Krome, ĉi tie la Estraro konfirmis vicprezidanton de TEĴA, la svedan esperantiston Kalle Kniivila. Li estas sperta ĵurnalista kaj tre aktiva esperantisto, kiu prizorgas nian retpaĝon. La atestilon, do membrokarton, kiu estos ne nur en Esperanto, sed en kelkaj aliaj lingvoj uzataj en Eŭropa Unio, kiun ricevos ĉiu membro, prizorgos la Estraro, pri kio la membroj estos poste informitaj".

INFANLIBRO DE LA JARO

Kadre de la Belartaj Konkursoj de UEA okazis ankaŭ konkurso pri la titolo "Infanlibro de la Jaro 2007", en kiu eldonejoj rajtis konkursi per libroj eldonitaj pasintjare. Partoprenis du libroj, el kiuj la ĵurio premiis "Breno kaj Bruno". Temas pri kolora 32-paĝa verko pri amikeco inter labradora hundo kaj ties mastro. Ĝi estas originale verkita en Esperanto de Paulo Sergio Viana, kiu jam kelkfoje antaŭe estis premiita en la Belartaj Konkursoj, interalie per la unua premio en la proza branĉo en 2002.

REZULTOJ DE LA ORATORA KONKURSO

En la Oratora Konkurso de la 93-a UK en Roterdamo partoprenis kvin gejunuloj el kvin landoj. La unuan premion gajnis Daniel Moreno Martinez el Meksiko pro parolado pri la temo "Ĉu oni devas kontraŭbatali la malaperon de lingvoj?" La duan premion ricevis David Welsh el Norvegio, kiu traktis la temon "Ĉu povas harmonie kunvivi malsamaj kulturoj?", kaj la trian Francesco Maurelli el Italio, kiu parolis pri la sama temo kiel la laŭreato de la unua premio.

PRI EVENTUALA ĴURNALISTA KONGRESO EN BULGARIO

Post la Tutmonda Kongreso de Esperantistoj ĵurnalistoj okazinta en Vilnius, cirkulis onidiroj, ke la dua kongreso okazos en 2010 en Bulgario. Klarigon pri tiu temo donis **Mariana Evlogieva**, kiu estis menciita kiel persono kiu kun s-ano Boĵidar Leonov jam entreprenis la paŝojn por ĝia okazigo. Jen ŝia respondo:

"Estimataj kolegoj, (...) Mi ŝatus konkretigi:

1. Mi kunlaboris kun s-ro Leonov dum sesio de AIS en Bulgario en 2005 kaj mi daŭre kunlaboras kun li kadre de la estraro de BEA. Sed mi mem apartenas formale nek al AIS, nek al la Internacia Universitato - Karlovo;

2. Por la jaro 2010 mi momente nenion "planas" - en Vilno mi konstatis, ke internacia ĵurnalista aranĝo tre verŝajne trovos apogon en Bulgario kaj dume esploras ĉu eblas okazigi tion post 2-3 jaroj. Ĝi certe ne nomiĝus "TEĴA-konferenco" - nek funkciantaj en Bulgario institucioj pretus pagi por pura TEĴA-aranĝo, nek mi rajtas anonci ĝin sen decido de TEĴA pri tio. Pli konvena formo estus ĵurnalista kongreso, kadre de kiu TEĴA havu la eblecon kunveni. Memkompreneble, se la ideo efektiviĝos, unue TEĴA-anoj ekscios kaj estos invititaj aliĝi. Sed bonvolu konsideri, ke dume temas nur pri esploroj, ne pri planoj."



Evangelia domo en Germanio - nia unua tranoktejo



La ventmuelejoj de Kinderdijk



Antaŭ la domo de Anne Frank



Van Gogh muzeo en Amsterdamo

***Kroata karavano al la ĉi-jara
Universala Kongreso de Esperanto
estis organizita de la firmao de Višnja
Branković "Orbis Pictus" el Triesto.
Ĉi-tie vi povas ĝui la vizititajn lokojn per
fokuso de fotilo de nia raportisto.***



Roterdamo el Eŭromasto



Sur la "stratoj" de Madurodam



Sur la digo de IJsselmeer



Amsterdama arkitekturo



La plaĝo de Scheveningen

Antaŭ la kongresejo post la solena fermo de la Kongreso



DERLANDO



Lignaj ŝuoj - tipaj memoraĵoj el Nederlando



Fromaĝ-produktejo



Hoteleto en Edam



Ĉe la reveno en Nurnbergo

SIMO MILOJEVIĆ HONORA MEMBRO DE UEA

En la inaŭguro de la 93-a UK en Roterdamo estis proklamita la decido de la Komitato de UEA elekti s-ron Simo Milojević kiel Honoran Membreon de UEA. Simo Milojević naskiĝis la 14-an de decembro 1936 en Kunja Glavica, Trebinje (Hercegovino), tiama Jugoslavio. Li esperantistiĝis fine de 1956. En la komenco de sia movada aktivado li estis sekretario de loka Esperanto-klubo, poste de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio kaj de Jugoslavia Esperanto-Instituto. En 1963 li estis ĉefredaktoro de "Jugoslavia esperantisto", poste de "La suda stelo" (1964, 1967-69). Kiel komisiito de UEA li restadis pli ol jaron (1960-61) en Hinda Unio kaj Nepalo por instrui Esperanton. Post sia transloĝiĝo al Nederlando Milojević redaktis la revuon "Kontakto" (1970-74). En 1974 li eklaboris en la Centra Oficejo de UEA, kiel vicdirektoro (1974-80) kaj redaktoro de "Esperanto" (1974-1984). De 1983 ĝis 1995 li estis ĝenerala direktoro de UEA. Li estis membro de la Akademio de Esperanto (1989-1998). En sia 60-a vivojaro, li decidis formeti ĉiujn movadajn funkciojn kaj labori kiel libroservisto kaj bibliotekisto en UEA, de 1996 ĝis la fino de 2002, kiam li pensiĝis. Ekde la fino de 2007 li vivas en Trebinje (Respubliko Serba, Bosnio kaj Hercegovino).

PREMIO DEGUĈI AL RENATO CORSETTI

En la fermo de la 93-a UK en Roterdamo estis anoncitaj diversaj premioj kaj distingoj. La plej prestiĝan el ili, Premion Onisaburo Deguĉi, ricevis Renato Corsetti. Premio Deguĉi estis starigita en la Jubilea Jaro 1987 per donaco de Oomoto por ĉiujare premii agadon, kiu pere de Esperanto antaŭenigas la internacian amikecon kaj solidaron en la spirito de Lazaro Ludoviko Zamenhof kaj Onisaburo Deguĉi.

Pri la ricevanto de la Premio decidis la Estraro de UEA. La Premio konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj. Aljuĝante la Premion al Renato Corsetti, la Estraro de UEA skribis: "Renato Corsetti estas unu el la plej elstaraj agantoj de Universala Esperanto-Asocio. Por li Esperanto estis ĉiam nedisigeble ligita al agado por pli bona mondo, por internacia amikeco, solidaro kaj paco. Antaŭenigi tiujn idealojn signifas al li antaŭenigi Esperanton, kaj tute aparte, disvastigi ĝin precipe al tiuj partoj de la mondo, kie la Internacia Lingvo apenaŭ aŭ tute ne havas adeptojn. Tio instigis lin al pionira laboro por krei Esperanto-movadon en multaj landoj de la Tria Mondo, precipe en Afriko kaj arabaj landoj, ĉiam celante, ke al la novaj esperantistoj la posedo de la nova lingvo fariĝu rimedo por plivastigo de siaj spiritaj horizontoj kaj por persona kresko."

LERNU.NET KAJ EDUKADO. NET DIPLOMITAJ

La Estraro de UEA rajtas rekonii eksterordinare meritiplenan agadon por la Internacia Lingvo per Diplomo pri Elstara Agado. La Diplomo estis starigita pasintjare. En 2008 ricevis ĝin du interretaj projektoj: *lernu.net* kaj *edukado.net*. La unua, *lernu.net*, estas plurlingva paĝaro, kiu estis lanĉita en 2002 kaj celas helpi al ret-uzantoj informiĝi kaj lerni Esperanton senpage kaj en facila maniero. Verŝajne ne estas troigoj diri, ke nuntempe ĝi estas la plej granda lernejo de Esperanto en la mondo. Ĝi estas vizitata averaĝe 75.000 fojojn monate. Ĉirkaŭ 7000 lernantoj jam kompletigis la unuan parton de ĝia baza kurso kaj 1500 lernantoj finis ĝian lastan, okan parton. La dua projekto, *edukado.net* estas retejo por instruistoj, prizorgata de Katalin Kováts. Ĝi celas subteni kunlaboron inter instruistoj, sed ĝi estas ankaŭ helpilo por memlernantoj. Ĝi estis lanĉita en 2001 kaj renovigita en

2005. En la retejo troviĝas i.a. katalogo de lerniloj, "lerniloteko" por interŝanĝi ekzercojn kaj testojn, leĝejo de lernosubtenaj materialoj, koresponda servo, ktp. La teamo de edukado.net liveris nemalhaveblan helpon por realigi la Esperantan version de la Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvo-ekzamenoj kaj de kelkaj jaroj prizorgas paroligajn lecionojn en UK-oj.

PREMIO GRABOWSKI AL DU INTERLINGVISTOJ

Fondaĵo Antoni Grabowski de UEA subtenas elstarajn atingojn de la Esperanta kulturo, precipe, sed ne nur, en la kampo de beletro. Ĉi-jare ĝiaj premioj havis interlingvistikan fokuson. La komisionanoj de la Fondaĵo (Ulrich Lins, István Ertl kaj Mine Yositaka) aljuĝis du egalrangajn premiojn, je la valoro de po mil usonaj dolaroj, al Ilona Koutny kaj Andy Künzli.

Ilona Koutny, hungara lingvistino vivanta en Pollando, kreis kaj jam de dek jaroj animas la popularajn kaj rekonatajn Interlingvistikajn Studojn ĉe Universitato Adam Mickiewicz en la pola urbo Poznano. Spirita heredantino de prof. Istvan Szerdahelyi, ŝi kvazaŭ transplantis la Esperanto-fakon de la Budapeŝta Universitato ELTE en polan grundon, kie ĝi disfloris internacie.

Andy Künzli, svisa politologo, pli ol 15 jarojn laboris super sia monumenta enciklopedio "Universalaj lingvoj en Svislando", kiu donas panoraman bildon pri 100-jara historio de la movado ne nur Esperanta, sed ĝenerale planlingva, en Svislando. La riĉa enhavo de tiu ĉi unika verko pri la planlingva movado de unu lando estas modela pro siaj scienca kompetenteco kaj objektiveco.

SUBVENCIO CIGNO FAVORE AL SRILANKO

Subvencio Cigno estas donata ĉiujare por subteni



REZULTOJ DE LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2008

POEZIO: Unua premio: Mikaelo Gishpling (Israelo) pro “Rekviemo”; **Dua premio:** Gerrit Berveling (Nederlando) pro “Mortis la Dioj”; **Tria premio:** Jean-Marie Ries (Luksemburgio) pro “Tiu vino” kaj “Lastaj pensoj de mortanta poeto”. Partoprenis 21 aŭtoroj el 16 landoj.

PROZO: Unua premio: Lena Karpunina (Rusio) pro “Ordinara vizaĝo”; **Dua premio:** Sten Johansson (Svedio) pro “Kemio”; **Tria premio:** Lena Karpunina (Rusio) pro “Novaj tempoj”. Partoprenis 24 aŭtoroj el 15 landoj.

ESEO: Unua premio: ne aljuĝita; **Dua premio:** Luiza Carol (Israelo) pro “Esperantismo kaj vegetarismo: similaj trajtoj”; **Tria premio:** ne aljuĝita; **Honora mencio:** Pieter Doumen (Belgio) pro “Lingvo: trezoro de la popolo”. Partoprenis 5 aŭtoroj el 4 landoj.

TEATRAĴOJ: Unua premio: ne aljuĝita; **Dua premio:** Geraldo Mattos (Brazilo) pro “Amo ne murdas”; **Tria premio:** ne aljuĝita. Partoprenis 6 aŭtoroj el 6 landoj.

FILMO: Partoprenis neniuj valida konkursaĵoj.



ESTONTAJ KONGRESOJ

Ĉe la solena fermo la vicurbestro de Bjalistoko Aleksander Sosna (vidu la foton) transprenis la kongresan flagon por porti ĝin al Pollando. Intertempe UEA decidis, kaj ĉe la solena fermo proklamis, ke la Universala Kongreso en 2010 okazos en Havano (Kubo).

agadon, kiu celas disvastigi Esperanton en evoluantaj landoj de la Tria Mondo. Ĝia valoro estas 500.000 japanaj enoj, t.e. proksimume 2950 eŭroj. La subvencion financas la japana mecenato Miyoshi Etsuo kaj pri ĝia celo decidis ĉiujare la Estraro de UEA.

Ĉi-jare Subvencio Cigno estis asignita al la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) por ĝia projekto Agado Srilanko. La projekto temas pri presado de la jam preta vortaro sinhala-Esperanto-sinhala, kaj sendado al Srilanko de esperantisto el Barato aŭ Nepalo por gvidi konversacian kurson al la lokaj esperantistoj, kiuj ĝis nun estas izolitaj de la ĝenerala movado, kaj por rektametoda kurso al neesperantistoj.

REZOLUCIO DE LA 93-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 93-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Roterdamo de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2008 kun 1845 partoprenantoj el 73 landoj por diskuti la kongresan temon “Lingvoj: trezoro de la homaro”,

Festante ĉi-jare la centjariĝon de Universala Esperanto-Asocio,

Notante la gravan rolon de lingvoj en la konservado de scioj kaj kulturoj, kaj en la ebligado de malsamaj aliroj al la mondo,

Rimarkante la daŭran diskriminacion kontraŭ lingvoj je ĉiuj niveloj kaj aparte kontraŭ la lingvoj de indiĝenaj popoloj kaj malplimulto, kaj

Atentigante pri la valoro de la facile lernebla kaj neŭtrala lingvo Esperanto, kiu estas mem lingva trezoro de la homaro, kaj pri la pli ol centjara sperto de ĝia praktika utilo kiel ligilo inter kulturoj,

Varme bonvenigas la decidon de Unuiĝintaj Nacioj, ke la jaro 2008 estu Internacia Jaro de Lingvoj, kaj alte taksas la iniciatojn de Unesko en tiu kampo menciitajn en la mesaĝo de ties Ĝenerala Direktoro al la Kongreso,

Reemfazas la neceson doni egalan respekton al ĉiu lingvo, al ĉiu kulturo kaj al ĉiu homo en la mondo,

Alvokas la Esperanto-komunumon disvastigi Esperanton kaj ĝiajn valorojn de respekto al ĉiu homo kaj de egaleco inter ĉiuj homgrupoj, kaj per tio kontraŭbatali la malaperon de lingvoj kaj kulturoj tra la mondo,

Invitas al kunlaboro kun ĉiuj organizaĵoj kaj instancoj kiuj laboras por konservi lingvojn kaj kulturojn kaj defendi lingvajn homajn rajtojn,

Instigas ĉiujn agnoski la esencan valoron de lingva diverseco, lige kun la kreskanta agnosko pri biologia diverseco, kaj

Proponas al la monda komunumo science esplori la rolon de Esperanto en pli efika kaj justa komunikado tra la mondo.

En majo en Krakovo okazis 3 samtempaj Esperanto-aranĝoj: la fremdlingva art-konkurso por lernejoj "Proksimiĝu al la mondo", la Scienc-Festivalo kaj solenaĵo organizita okaze de la tria datreveno de la agado de la Internacia Centro de la Kulturoj.

POLAJ EVENTOJ

✍ Małgorzata J. Komarnicka

📷 Piotr Nosek

Esperanto en prestiĝa art-konkurso en suda Pollando

La 15-an de majo okazis jam la dekkvina fojon la prestiĝa, vojevodia, lerneja art-konkurso "Proksimiĝu al la mondo". En la konkurso sian programon prezentis, interalie, la Zamenhof-lernejo en Zagórnik (apud Andrychów) kaj la ILEI-lernejo en Čajovice. La konkurson partoprenis ankaŭ prapranepino de Antoni Grabowski - Natalia Dobrowolska. La talentulino prezentis programon pri La Patro de la Esperanta Poezio.

Cirkaŭ mil lernantoj partoprenis la konkurson. Ili prezentis artajn programerojn: teatraĵojn, kantojn kaj dancojn, en kvar lingvoj instruataj en lernejoj: Esperanto, germana, angla, kaj franca. En la antaŭaj jaroj, aperis la rusa kaj itala. La pozicio de Esperanto en la konkurso estas forta, same forta kiel tiu de la

franca lingvo.

Esperanto-lernejoj el la sudpollanda vojevodio Małopolska jam plurajn jarojn partoprenas la konkurson, dank' al la zorgado de aro de Esperanto-instruistoj de ĉi tiu regiono. Ĉi tiu interesa kaj alloga konkurso havas grandan signifon por Esperanto, ĉar ĝi kontribuas al diskonigo de la lingvo, kaj tio faciligas enkondukadon de Esperanto en lernejojn. La organizantoj de la prestiĝa konkurso aprezas kaj substrekas la faktan, ke **ESPERANTO ESTAS ĈIUJARE REPREZENTATA EN LA KONKURSO.**

Esperanto en la Krakova Scienc-Festivalo

De la 15-a ĝis la 17-a de majo en Krakovo, en la tuta urbo, okazis granda Scienc-Festivalo. Dum ĉi tiuj tri plenaj tagoj, Esperanto estis diskonigata sur la

malnova krakova ĉefplaco, kadre de la prezentado de Jagelona Universitato (Filologia Fako). Seriozaj sciencoj, pri kiuj okupiĝas altlernejoj kaj sciencaj institutoj, estis prezentataj en amuza formo por ĉiuj, por plenkreskuloj kaj por infanoj. La prezentado de Esperanto en la Festivalo estis preparita de la Studenta Scienca Esperanto-Rondo de Jagelona Universitato, forte apogata de ILEI-Pollando. La Esperanto-stando vekis grandan intereson kaj estis vizitata de multaj personoj. Esperanto estis prezentata interese, bunte, leĝere, amuzforme kaj eĉ bonhumore. Kaj dum fulmrapidaj lecionetoj ni montris, ke oni povas ĝin plezure kaj rapide lerni.

La Esperanto-standon vizitis multe da personoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto, lernas aŭ iam lernis ĝin, sed ankaŭ tiuj, kiuj unuafoje aŭdis pri la lingvo. Tio estis eksterordinara aranĝo. Dank' al ĝi multe da homoj,



precipe studentoj, ekintersiĝis pri Esperanto kaj aŭtune verŝajne kelkaj el ili komencos lernadon de la lingvo en Jagelona Universitato.

Nia ĉeesto dum la KRAKOVA SCIENC-FESTIVALO ALPROKSIMIGIS ESPERANTON AL LA POLA SOCIO.

La vetero favoris nin, simile kiel niaj humoroj. Post la sukcesa aranĝo la preparintoj de la festivala prezentado de Esperanto: studentoj kaj la ILEI-Estraro, rigardis la spektaklon "Ozenek" (La edziĝo) de Nikolao Gogol, en la J. Słowacki-Teatro.

Jubilea renkontiĝo en la restoracio "Wierzynek"

En la fama krakova restoracio "Wierzynek", la 16-an de majo okazis solena renkontiĝo okaze de la tria datreveno de la Internacia Centro de la Kulturoj. Partoprenantoj de la renkontiĝo: esperantistoj kaj neesperantistoj-kunlaborantoj de ICK kaj gastoj invititaj de la direktorino, Maria Majerczak, kun granda plezuro aŭskultis ŝian prelegon pri la agado de la Centro, rigardis la prezentadon de filmetoj, fotoj, publikaĵoj, reklammaterialoj, kaj ĉeestis kvizon pri ICK.

Jen la agadprincipo de ICK: **Ni uzas Esperanton kiel ponton inter la kulturoj de la mondo kaj la pola socio.**

ICK estis fondita en majo 2005. Dum sia trijara ekzisto ĝi organizis por la vasta pola publiko 36 Esperanto-aranĝojn, inter ili 17 koncertojn de Esperanto-muziko. La aranĝojn ĉeestis entute kelkaj miloj da personoj. La Esperantlingvaj programoj, aranĝitaj laŭ difinitaj reguloj, okazadis en kulturcentroj, lernejoj kaj en publikaj aranĝoj de Sudpollando. Ili estis interpretataj en la polan lingvon.

Ĉiujn programojn prezentis diverslandaj esperantistoj, kies talentoj kaj

scioj estis alte taksataj de la pola publiko.

Post pluraj monatoj aperos libro (ankaŭ en elektronika versio) pri la agado de ICK - kun informoj, analizoj pri disvastigado de Esperanto pere de kulturaj aranĝoj, ideoj pri organizado de tiuj, komentoj, listo de la kunlaborantoj, multaj fotoj pri ili kaj kun Esperantaj muzikaĵoj, kiuj estis prezentitaj al polaj spektantoj.

Pri apero de la libro informos esperantistojn de la mondo la reta Novajservo de Pola Sekcio de ILEI. La materialo

troviĝos ankaŭ en la hejmpaĝo de ICK en <http://www.esperanto-reto.org>, kiam estos funkciigita la paĝaro.

Post la trijaraj bonegaj spertoj ni povas konsili al esperantistoj: NE FERMU VIAJN ESPERANTO-GASTOJN EN ESPERANTO-KLUBOJ! Viaj gastoj ofte volonte prelegas aŭ faras aliajn prezentadojn, kaj se tio okazas en lernejoj aŭ kulturdomoj de la koncerna lando, ili trovas tion tre interesa kaj kun ĝuo ili prezentas siajn kulturojn aŭ siajn artajn atingojn, kaj Esperanto tiel disvastiĝas.

EUROPO-DEMOKRATIO-ESPERANTO EDE EN BUDAPEŝTO



Sabate la 28-an de junio 2008 staris informtablo ŝirmita per tendo de la somera sunbrilego en la centro de Budapeŝto. Multe da pasantoj restis starante en la ombro de la EDE kaj informiĝis pri la ebleco solvi la lingvan problemon en la EU. EDE-anoj el Hungario, Francio kaj Germanio, vigle diskutis pri la lingvopolitiko kun tre diversaj kaj klerecaj interesiĝintaj civitanoj sur la strato (la arkaika komencejo de la demokratio).

SUKCESA REFONDO DE EDE EN GERMANIO

La 5-an de julio renkontiĝis en Wiesbaden 10 Esperanto-aktivuloj por refondi la germanan sektion de EDE. Estraranoj fariĝis Manuel Cebulla (prezidanto), d-ro Eugen Macko kaj d-ro Ulrich Matthias (vicprezidantoj), Konrad Gramelspacher kaj Alfred Schubert. La asocio havas sian sidejon en Wiesbaden kaj post nelonge registriĝos ĉe la tie tribunalo. En la sama tago la asocio nomumis siajn kandidatojn por la eŭropaj balotoj 2009. En sekreta voĉdono oni elektis por la lokoj 1 ĝis 11 de la listo la sekvajn kandidatojn: 1. prof. d-ro Reinhard Selten, 2. Manuel Cebulla, 3. d-ro Ulrich Matthias, 4. d-ro Eugen Macko, 5. Marianne Buchholz-Maurer, 6. Alfred Schubert, 7. Nan Matthias-Wang, 8. Steffen Eitner, 9. Monika Finnegan-Reuß, 10. Konrad Gramelspacher, 11. Hervej Taunton. La asocio celas kolekti 4.000 subtenajn subskribojn por rajti partopreni en la balotoj. Tiucele restas ĉirkaŭ 8 monatoj da tempo inter somero 2008 kaj la 31-a de marto 2009.

SUKCESA KONFERENCO DE OSIEK EN ŠEMPETER



vortaro hispana-Esperanta - nur kvar jarojn Diego elfaris ĝin, dum necesis poste naŭ jaroj por ĝia eldono, en kiu grave kunlaboris Antonio Valen.

Antonio Valen, kiu intime konis la majstron, nature kontribuis al la prelegaro pli ol la aliaj prelegantoj: Catherine Kremer, Josef Dorr kaj mi mem. Laŭ regulo de IEK du eksteremaj prelegoj kompletigis la serion: dimanĉmatene prelego de Viŝnja rilatis al la malsimpla historio de la landeto Slovenio. Poste oni iom senpacience atendis la alvenon de Josip Pleadin, kiu merkrede enkondukis nin en la Esperantan literaturon de Kroatio; ankaŭ lia temo estis vasta, tro vasta; kompreneble Ivo Lapenna, Spomenka Ŝtimec, Zora Heide estas konataj, sed oni ŝatus aŭdi pli pri gravaj verkoj tradukitaj, el Krleža kaj Jeluŝić, el Andrić kaj Selimović. Krom la Nobel-premiito Ivo Andrić, mi malkovris ilin per Esperanto. Ni do konsciis pri la vigleco de Esperanto en Kroatio; cetere la antologio "Moderna kroata prozo", kiu kuŝis de 12 jaroj en la libroservo, tuj vendiĝis post la prelego de Josip Pleadin. Alia signo de tiu vigleco: ĉi-jare du kroatoj estis inter la 5 favoratoj por OSIEK-premio 2008: Josip Pleadin por "Ordeno de verda plumo" kaj Spomenka Ŝtimec por "Kroata milita noktlibro".

Grava kaj ŝatata tasko de IEK-oj estas la atribuo de OSIEK-premio. Tiu ĉi estas tute demokrata. Ĉiu OSIEK-membro rajtas proponi vivantan aŭtoron por ŝatata verko nefikcia ĝis komenco de majo. El inter la

Madeleine de Zilah


OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj) estas rendevuejo de esperantistoj kiuj ŝatas renkontiĝi kaj senfanatisme diskutadi sentabuajn temojn. La celo de OSIEK-konferenco (IEK) estas prezenti prelegojn kaj pridiskuti ilin en etoso de amikeco kaj reciproka respekto; la familia etoso de negranda aranĝo favoras tiun celon. IEK okazas ĉiujare en alia loko, kiel eble interesa el vidpunkto de kultura turismo.

Ĉi-jare la konferenco okazis en Slovenio, je invito de Viŝnja Branković. Ni komforte, kaj ne koste loĝis, manĝis, prelegis, kafbabilumis, librosservis, distriĝis en ununura loko: en moderne ekipita studentejo, rande de urbeto, lime de klifa arbaro. Je mia alveno mi notis ke el trideko da aliĝintoj, dektri unuan fojon partoprenis, sed danke al la agrabla kadro planita de Viŝnja, la novuloj facile integriĝis kaj kunhelpis.

La temo estis: Fernando de Diego. Pritrakitis ĝin kvar prelegantoj per sep prelegoj, sekvataj de debatoj. Kompreneble la personeco de Diego estas tiel forta kaj lia verkaro tiom ampleksa, ke ne eblis elĉerpi la temon. Ni tamen ricevis:

- detalan analizon
- per unu poemaro - de la poezia tradukarto de Diego,
- detalan prezenton de proza novelo modele tradukita de li,
- imponan komparon de la lingvaj principoj de Fernando de Diego kaj de Karolo Piĉ,
- klaran bildon pri la originalaj verkoj de Diego,
- sintezon pri lia vasta recenza verko,
- densan panoramon de liaj prozaj tradukoj el la hispana kaj el la angla,
- rakonton de la genezo de lia krona verko: monumenta

ĈU VI SAKRAS EN ESPERANTO?

 Josip Pleadin

Longan artikolon sub tia titolo (kroate: "Psujete li na esperantu?") publikigis la 20-an de julio "Sveznadar" (aldonaĵo de la zagreba tagjurnalo "Večernji list"). La tekston verkis konata kroatia ĵurnalisto Miroslav Ambruš-Kiš, kaj unuamome, oni povus pensi ke temas pri malreklamo de Esperanto. Sed evidentiĝas, ke la ĵurnalisto bone konas sian metion, aŭ almenaŭ bone trastudis la temon. La subtitolo de la artikolo estas "La diplomatia lingvo havas ankaŭ la stratlingvon". La teksto komenciĝas per informoj pri Esperantujo, pri nombro de parolantoj de la lingvo, sed troveblas ankaŭ troigoj, kiuj kutimas en Esperanta informado. Ekzemple, la aŭtoro asertas, ke la papoj (Paŭlo Johano la Dua kaj Benedikto la Dek-sesa povis libere konversacii en nia lingvo). La teksto mencias 25.000 librotitolojn en Esperanto, kio pli-malpli povas esti vero, sed la daŭrigo mencias Esperanton kiel lingvon de alternativaj kaj religiaj homgrupoj, kio ja subkonscie instigas pensi pri esperantistoj nur kiel pri sektismaj organizaĵoj (Homeini, bahaanoj, oomoto, spiritistoj). Tamen, al la aŭtoro oni ne povas ripriĉi malbonan konon de la afero: li tute kompetente parolas pri "Plena vortaro", kaj konstatas, ke la vulgaraĵoj kaj trivialaj vortoj, sakraĵoj kaj blasfemoj, ne troviĝas en la vortaroj de Esperantujo, sed ili estas iaspeca stratlingvo. Kiel bonan ekzemplon de riĉigo de la vortaro de Esperanto, la aŭtoro mencias la poemarojn "Mondo kaj koro" kaj "Sekretaj sonetoj", prezentante la faktojn, kiujn eĉ multaj esperantistoj ne konas. Ekzemple, li mencias la specifajn vortarojn de tabuaj vortoj de Hektor Alois kaj Kiril Velkov, kaj poste ankaŭ la verkon de Corsetti "Knedu min, sinjorino". Li tre bone konas ankaŭ la kreivecon de Esperanto en kunteksto de fivortoj, tabuaj kaj insultaj vortoj, kaj fine de la teksto li mencias ankaŭ plurajn ekzemplojn. En aparta aldona artikolo titolita "Ankaŭ la hebrea estas konstruita same kiel Esperanto", la aŭtoro donas plurajn interesajn faktojn pri Esperanto en tre kurta formo, sed en tre efika maniero. Li konstatas, ke "Ludoviko Lazaro Zamenhof deziris, ke la internacia lingvo fariĝu vivanta, sed la konservativa sinjoro eĉ ne songis ...", kaj ni aldonas: "ke lia foto aperos en prestiĝa zagreba ĵurnalo kun nudaj inaj mamoj sub la okulvitroj".

proponoj la 5 plej oftaj estis prezentitaj vendrede, la 18-an de julio 2008, al la ĝeneralala asembleo de OSIEK: unua sekreta baloto elektis 2 el la 5, Josip Pleadin kaj Sergej Pokrovskij; dua sekreta baloto donis la premion al Pokrovskij, por "Komputila leksikono". La premio estas nun 600 eŭroj, ĝi entute elvenas el la modestaj kotizoj de la membraro. Ankaŭ ĉi tiu kotizo estas demokratia: valoro de 25 poŝtmarkoj por sendi enlandan leteron. Simila demokratia kalkulmaniero, ne tuj komprenebla kvankam justa, ekzistas por la aliĝkotizoj al IEK. Similaj demokratiaj voĉdonadoj ankaŭ okazis vendrede: por nova komitato de OSIEK (prezidanto: s-ino Anne Jausions), por loko de IEK en 2009 (Kondoros, Hungario), por temo de IEK-2009 (Humura literaturo en Esperanto).

Poste ni iom post iom disiris, inter vendredo kaj la posta lundo, pli riĉaj je Esperanta kulturo, pli riĉaj je mondkulturo, pli riĉaj je novaj amikoj kaj belaj memoroj: la naturaj belaĵoj de la regiono, fascina karsta vilaĝo duonruina, grandioza sunsubiro kaj festena vespero en montpinta restoracio, varma voĉo kaj spiceta sprito de Saša Pilipović, festa lasta vespero ĉesigita de pluvo je la 4h00 (nokte)... kiam ĉiuj vinboteloj elĉerpiĝis kaj restis vekaj nur kelkaj amikoj ĉirkaŭ Viŝnja, merite feliĉa pro tiu sukcesa konferenco.

OSIEK

IEK 2009

Internacia Esperanto-Konferenco

en KONDOROS, Hungario
18a-24a de julio 2009
pri

*Humura literaturo
en Esperanto*

OSIEK-PREMIO 2009

Kontaktoj: Pál Kozsuch,

Vasut u. 3, 5553 Kondoros, Hungario
+36 30 24 09 970 pauljuno@freemail.hr

Eric Laubacher, 1 rue de Bougainville,
78180 Montigny-le-Bretonneux, Francio.

+33 1 30 96 67 91 kasisto@osiek.org

<http://osiek.org>



SUKCESA KONGRESO - KONTENTAJ KONGRESANOJ

Antun Kovač

Inter la 11-a kaj 18-a de julio ĉi-jare, en Eduke-rekapabla kampadejo de blinduloj en la istria vilaĝo Premantura, Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj (KUNE) gastigis la 74-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj. Kvankam la preparoj por tiu aranĝo komenciĝis apenaŭ en novembro pasintjare, la organiza komitato (Antun Kovač, Dragan Štoković, Štefica Mutak, Vjekoslav Morankić kaj Marija Repac), sukcese kaj ĝustatempe finis ĉiujn preparlaborojn. La 12-an de julio Vjekoslav Morankić solene malfermis la kongreson. Post la komuna kantado de "La Espero", kaj salutmesaĝo de Keranka Miluševa, reprezentantino de bulgara organizaĵo de blindaj esperantistoj, kiuj organizis la antaŭan kongreson, estis legita salutmesaĝo de Jadranka Kosor, vicprezidantino de la Registaro de Respubliko Kroatio, kiu prezentis staton kaj aktivecojn rilate la zorgon pri invalidaj personoj en Kroatio.

La labora parto de la kongreso komenciĝis per enkonduka prelego pri la kongresa temo "Nevidantoj en medio - vivo en grandaj urboj", kiun prezentis Lino Fučić, reprezentanto de kroata Ministerio pri protektado de medio, spacplanado kaj

konstruado, kiu estis oficiala aŭspicianto de la aranĝo. Enkadre de la kongresa temo estis aŭskultitaj ankoraŭ tri prelegoj de jenaj aŭtoroj: Mira Katalenić (Kroatio), Antun Kovač (Kroatio) kaj Nedeljka Ložajić (Serbio). La ĉefa mesaĝo de la kongreso pri tiu temo estas legebla en la kongresa rezolucio.

Tre interesajn prelegojn prezentis ankaŭ hungara partopreninto Attila Varro kaj finno Arvo Karvinen, dum la kulturala programon prizorgis la geedzoj Jelinek el Ĉeĥio, Attila Varo el Hungario kaj Milan Mesić el Kroatio. Kvizon preparis Rolando Butković el Kroatio, literaturan vesperon Spomenka Štimec el Kroatio kaj per muziko de la istria regiono prezentiĝis la dueto "Magnolia" el Pula.

Turismaj programoj gvidis la partoprenintojn al tuttaga ekskurso tra Istrio, dum sportaj programoj okazis en disciplino de ŝako kaj kegloludo.

La kongreso estis specifa pro partopreno de junaj esperantistoj gviditaj de Tena Kuzmanović, lernantino de sesa klaso de elementa lernejo, kaj inter la ĉeestintoj troviĝis ankaŭ 12 vidantaj esperantistoj, kiuj estis helpantoj kaj egalrajtaj partoprenintoj en la programoj.

Okazis du kunvenoj de la Ĝenerala Asembleo de LIBE, kiuj tamen ne sukcesis difini kie okazos sekvontjara kongreso de blindaj esperantistoj.

Sume la kongreson partoprenis 76 esperantistoj kaj helpantoj el 14 landoj kaj tri specialaj gastoj: Ivo Borovečki, Vjekoslav Morankić kaj Boris DiCostanzo. La delegacio de KUNE nombris 12 membrojn, kaj aliaj partoprenintoj venis el Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥio, Danlando, Finnlando, Italio, Hungario, Nederlando, Germanio, Rumanio, Rusio, Serbio kaj Ukrainio.

La kongresan laboron sekvis ankaŭ ĵurnalistoj de lokaj informmedioj: "Glas Istre", Radio-Pula, Nezavisna istarska televizija ktp. La organizantoj aparte ĝojas, ĉar la ĝenerala impreso de ĉiuj partoprenintoj estas tre pozitiva. Ĉe la fino de ĉi-tiu raporto, la organizantoj aparte dankas pro la helpo la Ministerion pri protektado de medio, spacplanado kaj konstruado kaj ĝian ministrinon Marina Matulović-Dropulić, Kroatan unuiĝon de nevidantoj kaj la personaron de Eduke-rekapabla kampadejo en Premantura estratan de Anton Krelja.

Diraĵoj eternaj kaj ripetendaj

"Mi ne konsentas kun iuj de vi eldiritaj vortoj, sed mi batalos ĝis la morto por via rajto vin esprimi!" - *François-Marie Arouet Voltaire*

"Kiu ne scias en kiun havenon li velŝipas, neniu vento al li konvenas." - *Seneko*

"Ne demandu vin kion via lando povas fari por vi - demandu vin kion vi povas fari por via lando!" - *J.F. Kennedy*

REZOLUCIO

La 74-a kongreso kaj la ĝenerala asembleo de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) akceptis jenan rezolucion:

Alvoko 1

La ĝenerala asembleo de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj alvokas decidfarantojn de komunumoj, ŝtatoj kaj institucioj de Eŭropa Unio en siaj decidoj konsideri aliron de viddifektitoj al edukado, profesia trejnado kaj enlaborigo, kaj tiamaniere preventi diskriminacion.

Konstruata medio devas esti sekura al ĉiuj.

La ĝenerala asembleo kun plezuro konstatas, ke Eŭropa blindula unio (EBU) konscie agadas por efektiviĝi partoprenon en socio.

Alvoko 2

La ĝenerala asembleo de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj konstatas, ke lingvosciaj gejunuloj, kiuj interesigas pri internacieco, ne havas kontentigajn taskojn en la okupoj de internaciaj organizoj. Ekde 1921 komenciĝinta tradicio de ĉiujaraj internaciaj kongresoj de blindaj esperantistoj ofertas eblecon ricevi interkulturajn rilatojn kaj al partoprenantoj pretecon al internacia kunlaboro. Tial informado pri la internacia lingvo Esperanto kaj kontaktoj kun blindulorganizoj estas necesaj.

La ĝenerala asembleo alvokas Esperanto-unuigojn de viddifektitoj kune kun naciaj blindulorganizoj subteni pere de Esperanto la dum jardekoj kreitan kulturon.

Pere de la revuo "Esperanta Ligilo", reto de delegitoj kaj kontaktpersonoj en naciaj blindulorganizoj Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj dum periodo 2009-2012 distribuu informojn pri Esperanto-materialoj, studeblecoj, internaciaj renkontiĝoj kaj instigu al najbarlanda kunlaboro.

Nedeljka Ložajić, prezidanto de LIBE
Antun Kovač, kongresa prezidanto

BONA INTENCO KUN MAGRA REZULTO

Josip Pleadin

En la momento kiam Kroata Esperanto-Ligo preparas ampleksan presan eldonon de Esperanto-kroata vortaro de Lucija Borčić, iomete fantaste sonis la informo kiu ni ĵus eksciis: en Kroatio jam ekzistas reta vortaro kun 100.000 vortoj! Laŭ nia scio, lanĉis tiun vortaron firmao "Taktika Nova" el Zagrebo, specialigita pri tradukaj kaj retvortaraj aferoj en pluraj lingvoj.

Volante esplori la verecon de la informo kiu nin atingis, ni kotnaktis la eldoniston, kaj komencis testi la vortaron.

Laŭdire la vortaro estas senpage uzebla ĝis la fino de 2008, sed tamen oni devas pagi 49,90 kunaon por ricevi permeson aliri la datumbazon de la vortaro.

Ĉi-momente ne estas konate kiu pretigis tiel ampleksan vortaron, sed evidente temas pri personoj ekster Esperantujo, ĉar la rezultoj de la testado donis praktike tute negativan impreson.

En la kelktaga testado ni sukcesis trovi jenajn mankojn:

1. La ortografio uzata ne estas Esperanta, kaj ne estas unuecigita. Iuloke la supersignitaj vortoj estas anstataŭigitaj per literoj sen supersignoj, dum aliloke estas uzata x-konvencio.

2. Kvankam la vortaro estas uzebla dudirekte, ĝi funkcias tre malbone. Eblas uzi anstataŭigan signon (*), ekzemple, se vi entajpas "kol*", vi ricevos ĉerpajon el la vortaro de maksimume 40 vortoj kiuj komenciĝas per tiuj tri literoj. Sed, vi ricevos ankaŭ la difinojn tute malgustajn. Jen hazarda ekzemplo. Kiam mi tajpis la vorton "cindro", la vortaro ofertis al mi jenajn difinojn en la kroata: jasen, jesen, pepeo, prah, zemni ostaci, žar. El tiuj difinoj nur la vorto "pepeo" plene respondas al la serĉita vorto, dum pluraj estas tute malgustaj.

3. La serĉrezulto implicas, ke Esperanto estas malfacile uzebla lingvo kun multdifinaj vortoj, kio ne egalas al la vero.

Eble la intenco de la eldonisto estis bona, sed la rezulto malebligas praktikan uzadon de la vortaro. Unuigo de Zagrebaj Esperantistoj proponis al Taktika Nova helpi en plibonigo de la projekto, sed definitivan respondon ĝis la finpretigo de ĉi-tiu numero de nia gazeto ni ne ricevis.

Por interesigantoj, la vortaro troviĝas ĉe: <http://www.taktikanova.net/eohhome>.



STJEPAN RADIĆ - EŬROPA KAJ MONDA VIZIULO

Pasis ok jardekoj post la morto de la kroata politikisto kaj juristo Stjepan Radić.

La aktiveco de Stjepan Radić ne estis nur politika batalo por la popolo, kampanoj kaj kroata nacia ekzistado. Lian agadon oni povas serĉi ankaŭ en temoj kaj problemoj ankoraŭ tre aktualaj por la kroata popolo – okdek jarojn post lia tragika morto.

Stjepan Radić, popole nomita Stipica, estis naskita la 11-an de junio 1871. Lia politika vojo kaj batalo "kiel instrui kaj defendi la popolon" komenciĝis dum gimnaziaj tagoj. Tre juna, kun Vladimir Vidrić, kroata poeto kaj unu el niaj unuaj esperantistoj, Radić en 1895 ĉeestis dum la alveno de la imperiestro Francisko Jozefo la bruligon de hungara standardo en Zagrebo. Eksigita el la zagreba jura fakultato, li studis en Prago. Komence li estis membro de Kroata partio de rajtoj (Hrvatska stranka prava), sed poste kun sia frato Antun, la 8-an de januaro 1904, li fondis Kroatan popolan partion (Hrvatska narodna stranka) kiu pli poste ŝanĝis la nomon al Kroata kampana partio (Hrvatska seljačka strana = HSS).

Kiam la 29-an de oktobro 1918 Kroata parlamento (Sabor) proklamis disigon de ĉiuj ŝtaturaj ligoj inter Triunua reĝlando Kroatio, Slavonio kaj Dalmacio disde Aŭstro-Hungario, li havis faris unu el siaj elstaraj paroladoj en la domo de la kroata parlamento dom novestablita Popola konsilantaro de Ŝtato de Slovenoj, Kroatoj kaj Serboj la 24-an de novembro 1918. Lia tiama parolado entenis prognozitan frazon, kiu daŭre en la historio de kroatoj estas ripetenda: "Sinjoroj! Anokraŭ ne estas mafriue! Ne hastu kiel anseoj en nebulo!"

Radić, postulinte restitucion de memstara kroata respubliko en 1919, kaj kontraŭstarinte la kruelaĵojn de serba soldataro en Kroatio, estis enkarcerigita kun aliaj tri membroj de Partio de rajtoj. En la jaro 1921, ĉe la kunveno de respublikana plimulto en la banuslanda Kroatio estis akceptita Konstitucio de neŭtrala kampana respubliko Kroatio kiun preparis Stjepan Radić. Tio estis "fundamenta scienco" de lia partio. Ĉe la ŝtat-elektoj en Jugoslavio en la jaro 1923 li ricevis sepdek mandatojn kaj provis kun serbaj politikistoj preparoli konfederaciajn rilatojn kun Serbio. La provo fiaskis kaj eĉ rezultis la malpermeson de uzado de kroata lingvo. Multaj el inter iliaj starpunktoj el tiu tempo fatale influis la estontecon de Kroatio, influante ankaŭ la ne tro foran kroatan pasintecon. Beadŭrinde, li retirigis de la politiko de la "patro de Hejmlando" d-ro Ante Starĉević pri kroatoj de du religioj.

*Radenko
Milošević*



*Stjepan Radić
sur 200-kunaa
kroatia monbileto*

Stjepan Radić – esperantisto

Stjepan Radić estis viziulo pri kiu oni nesufiĉe scias. En "Biografia leksikono de kroataj esperantistoj" (el la jaro 2000) oni povas legi mallongan teksteton, ke li estis "bona esperantisto kiu kiel ministro pri klerigado planis enkonduki internacian lingvon en lernejoj, sed la morto malebligis lin".

La Esperanta gazeto "Konkordo" en la numero 3 el marto 1926 publikigis tekston pri la kunveno de la prezidanto kaj sekretario de la "Sudslava Esperanto-Ligo" ("Saveza esperantista kraljevina Srba, Hrvata i Slovenaca") d-ro Dušan Maruzzi kaj Ivo Rotkvić kun la ministro de klerigado s-ro Stjepan Radić. La teksto precize priskribas la interparolon kiu okazis la 15-an de marto, kiam Radić deklaris ke li mem lernis Esperanton kaj estas "la plej entuziasmigita esperantisto". Li aldonis, ke laŭ lia opinio "estas barbarismo hodiaŭ ne lerni Esperanton". Krom la promeso de Radić, ke li ordonos enkondukon de Esperanto en ĉiuj ekonomiaj lernejoj kaj eble per "Dia volo ankaŭ en ĉiuj lernejoj", ĉe la fino de interparolo "la s-ro ministro ordonis al sia sekretario, noti ke oni faru cirkuleron rilate al Esperanto".

Bedaŭrinde, la batalo de Radić por ŝtata sendependeco de Kroatio kaj reorganizo de la tiama sudslava Reĝlando kaj liaj bonaj intencoj pri instruado de Esperanto en lernejoj estis ĉesigitaj per la atenco en la beograda parlamentejo. Estis multaj antaŭavertoj, kiuj indikis al Radić ke estus pli bone ne vojaĝi al Beogrado, ĉar oni flustris pri preparo de atenco al kroataj deputitoj. La 20-an de junio 1928 la serba radikaluloo Puniša Raĉić, pafis en la beograda parlamento al la deputitoj de Kroata kampana partio. Tuj estis murditaj Pavao Radić kaj Gjuro Basariček, kaj vunditaj Ivan Pernar, Ivan Granda kaj Stjepan Radić, kiu pro la ricevitaj vundoj mortis en Zagrebo la 8-an de aŭgusto 1928.

KION RADICĈ DIRIS PRI ESPERANTO?



"Konkordo" numero 3 el marto 1926 en sia ĉefartikolo publikigis ankaŭ la tekston de la interparolo inter Radicĉ kaj la reprezentantoj de Sudslava Esperanto-Ligo



La organiza teamo de MIRO

MAGIVERDA INTERNACIA RENKONTIĜO

Inter la 2-a kaj 8-a de aŭgusto, KEJA (Kroata Esperantista Junulara Asocio) organizis (ĉefe junularan) renkontiĝon sub la titolo MIRO (=Magiverda Internacia Renkontiĝo). La renkontiĝo okazis en Duga Resa, kaj ĝi sukcesis venigi 70 gejunuloj el 16 landoj al Kroatio.

Laŭ informoj ricevitaj de aliaj medioj, aparte interesaj estis du programoj, kiuj altiris atenton de loka publiko kaj kroataj esperantistoj. La 4-an de aŭgusto en la Kinejo de Duga Resa okazis koncerto de perkutaj instrumentoj, kiun realigis junaj muzikistoj el Svislando kaj Kroatio.

Unu tagon poste, la 5-an de aŭgusto, je la Tago de patrolanda danko, okazis koncerto de kultur-arta societo "Izvor" el Generalski Stol kaj programo nomita "Kuirarto sen limoj", kiu prezentis simplajn manĝojn karakterizajn por landoj el kiuj venis la partoprenintoj de MIRO. Tiuokaze estis presita ankaŭ recepto-libro.

Dr. Maruzzi: Ministra Moŝto! Ni venis en la nomo de SEL por esprimi al Vi - kiel al la ĉefo de la kulturministerio - nian estimon. Sed ni devas ĉi-okaze ankaŭ plendi al Vi, ke multaj lernejestroj kaj profesoroj malhelpas instruadon de Esperanto.

Sro Ministro: Kio? Tio ne estas ebla! Tio ne plu devas okazi. Mi ja mem lernis Esperanton kaj fariĝis la plej entuziasma esperantisto, sed tro okupita per la politikaj aferoj mi ne povis ĝin finlarni. Sed tuj, kiam mi disponas por sufiĉa tempo, mi promesas honorvorte, ke mi ĝin ellernos, ĉar mi opinias, ke estas barbareco nuntempe ne lerni Esperanton. **Komence de la nova studjaro mi enkondukos Esperanton en ĉiujn komerc-cajn lernejojn, eĉ eble, se la cirkonstancoj estos favoraj - en ĉiujn lernejojn.**

(Post tiuj ĉi vortoj la minsotro ordonis al sia sekretario noti, ke oni faru cirkuleron rilate al Esperanto).

Dr. Maruzzi: Post via deklaro, Ministra Moŝto, estus ĉiu nia vorto superflua.

Sro Ministro: Jes! Tio nur signifus verŝi akvon en la maron. Vi laboris ĝis nun: honeste, saĝe kaj persiste. Tial mi petas vin, daŭrigu sammaniere plu kaj salutu ĉiujn gesamideanojn.

Dr Maruzzi: Ĉu vi permesas al ni, Ministra Moŝto, publikigi viajn vortojn?

Sro Ministro: Certes vi povas! Kiel ne? Post kelkaj privataj vortoj direktitaj al Dr Maruzzi, adiaŭis la ministro plej bonvole la reprezentantojn de la SEL.

LIMDATO POR FAVORPREZE ANTAŬPAGI LA PLEJ APLEKSAN ESPERANTO-KROATAN VORTARON, la vortaron aŭtoritan de Lucija Borĉić, finiĝas la 31-an de oktobro 2008. Ĝis tiu dato la prezo de la vortaro estas 190,00, dum la posta estos 320,00 kunaoj. Pagojn bonvole direkti al bankkonto n-ro **2484008-1100881157** de Savez za esperanto Hrvatske, Kneza Mislava 11, 10000 Zagreb, kun samtempa informo aŭ sendo de kopio de la pagilo. Transpreno de vortaroj okazos en Zagrebo. Se vi volas ricevi ĝin perpoŝte, aldonu la sumon de 15,00 kunaoj. La proponita prezo validas por enlandaj klientoj.

GRANDA DONACO AL ESTONTA DOKUMENTA ESPERANTO- CENTRO

Dum la Universala Kongreso en Roterdamo, Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj lanĉis la ideon pri Dokumenta Esperanto-Centro. Multe pli antaŭ tiu oficiala informo, pluraj unuopuloj kaj institucioj helpis per siaj materiaj donacoj la estontan DEC-on. Ne malgravigante la aliajn (ekzemple la grandajn donacojn de Nada Med kaj Velimir Piškorec), ni tamen devas aparte elstarigi unu el la plej grandaj donacoj, kiun en du fazoj faris Dušan Adnad el Borovo. Samideano Adnad estas konata al esperantistoj kiel redaktoro de iam tre populara Esperanto-revuo "Voĉo". Dum plena jardeko li redaktis kaj eldonis ĝin, kaj dum tiu tempo ĉe li kolektiĝis multega interesa materialo: libroj, gazetoj, dokumentoj, fotoj ktp. Pasintjare li proponis, ke la tuta materialo estu konservita en la arkivo Pleadin, post kio sekvis du fazoj de transporto: la 5-an de novembro 2007 kaj la 5-an de aprilo 2008. Kvankam ĉiu papereto ne estis precize notita, temas pri la plej granda donaco entute, kiu konsistis el minimume 700 libroj kaj broŝuroj, 3000 gazetnumeroj, 127 fotoj, 6000 folioj da korespondataj kaj multaj aliaj materialoj. Pri DEC ni faros detalan raporton en iu alia numero de nia gazeto, sed jam nun ni invitas ĉiujn samideanojn en Kroatio kontribui per siaj Esperantaĵoj. Forjetu nenion - ĉio estas valora materialo por nia estonta esplorcentro.

VERKISTOJ RENKONTIĜIS

Jam tradicie Renkontiĝo de Esperantlingvaj Verkistoj okazis ankaŭ ĉi-jare, inter la 15-a kaj 17-a de aŭgusto, en la Bieno Njeguš en Hrašćina-Trgovišće sub aŭspicio de Akademio Literatura de Esperanto kaj kun financa helpo de Ministerio de Kulturo de Respubliko Kroatio.


La unuan tagon okazis fermita kunsido de verkistoj kaj la tria tago (dimanĉo) estis rezervita por ekskurso. La ĉefa programparto okazis sabate, la 16-an de aŭgusto en posttagmezaj kaj vesperaj horoj. Post la komuna pikniko, je la 14h00 estis malfermita la programo, en kiu unuafoje prezentiĝis la aŭspicianto, novfondita Akademio Literatura de Esperanto (ALE). Ĝia fondkunveno okazis en la 93-a Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo, la 24-an de julio. Ĝi daŭrigos la laboron de Esperantlingva Verkista Asocio (EVA), kiu per fondo de ALE formale ĉesas ekzisti, kvankam efektive temas nur pri nomŝanĝo, kaj pliampleksigo de taskoj. (Pli detale vidu en www.everk.it). La novan organizaĵon enkonduke prezentis Spomenka Ŝtimec, la sekretario de ALE. Ŝi ankaŭ prezentis la ampleksejan anglalingvan verkon de Geoffrey Sutton "Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto", kiu aperis senpere antaŭ la Universala Kongreso ĉe la novjorka eldonejo "Mondial". Aparte estis sendita poezia saluto al Marjorie Boulton en Oksfordo.

La ĉefaj gastoj de la verkista aranĝo estis Lena Karpunina (vidu la intervjuon kun ŝi en la paĝo 130) kies verkado estis kronita per du premioj en la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj: 1-a kaj 3-a premioj por prozaĵoj "Ordinara vizaĝo" kaj "Novaj Tempo", kaj Ljubomir Trifonĉovski, kiu preparis eseon pri "Verkistinoj en Esperantaj Enciklopedioj". Enkonduke

pri Lena Karpunina prelegis Zdravko Seleš per teksto "Legante novelojn de Lena Karpunina", kiun vi povos legi en la gazeto "Tempo". Ŝiajn verkojn legis Nevenka Imbert.

Spomenka Ŝtimec prezentis ankaŭ la projekton kiun en Dubrovnik realigis someraj festludoj. Nome, inter 18 lingvoj en kiuj aperis la verko de Marin Držić "Dundo Maroje", troviĝas ankaŭ la Esperanta traduko "Onklo Maroje" farita de Lucija Borčić. (vidu tekston pri tiu temo en la paĝo 113).

Vespera koncerto "Virinoj en kanzonoj" de Attila Schimmer el Vieno ne okazis pro la doganproblemoj, kaj la aŭstran kabarediston anstataŭis per sia koncerto Đovani Furlan el Sisak.



Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto. Detala kaj bone dokumentita rigardo al 120 jaroj da Esperanta literaturo. Aŭtoro: Geoffrey Sutton. Eldonis: Mondial, New York, 2008. Amplekso: 728 paĝoj. Prezo ĉe UEA: 45.00 eŭroj.

SPEGULO Zdravko Selež

NE FORGESAS

"SPEGULO", socikultura,
sendependa revuo en Esperanto,
n-ro 1 (1/2008)

Kiam printempe de ĉi-jaro min atingis la unua numero de revuo "Spegulo", eldonita de pola eldonejo "Hejme", iomete konante la redaktoron Tomasz Chmielik, mi atendis literaturan revuon, sed jam la subtítulo atentigis pri alia intenco - socikultura, sendependa revuo en Esperanto. La redaktoro en la antaŭparola teksto riĉe klarigis kialojn kaj celojn de la revuo. Ni citu:

"Kiel mi jam diris: nin - redaktorojn kaj kunlaborantojn - ligas komuna sperto de la memorinda tempo en 1989, kiu alportis ŝanĝojn en ĉiuj sferoj de la orienteŭropa vivo. Post la kruelegoj kaj teruraj spertoj de hitlerismo kaj stalinismo, post jaroj de ekonomia rabo-politiko, post konstanta detruado de ĉiuj strukturoj de la civitna socio ni devis konstrui la personan vivon denove, redefini ĉiajn valorojn kaj alfronti ĉiam pli novajn problemojn, kiuj neeviteble aperis kaj bremsas progreson. (...)

Venontjare ni solenos la 20-jariĝon de tiu granda ŝanĝo. Estas sufiĉe longa tempo por fari iajn konkludojn, por malbari novajn vojojn, kiuj kondukas al kvalitigo kaj kvantigo de nia Zamenhofa komunumo. Kial la kvalitigo ni metas antaŭ la kvantigo? Pro tutsimpla kaŭzo. Sen kultura elito ĉiu nacio, ĉiu popolo, homgrupo, ĉiu komunumo - eĉ la plej malgranda - ne havas la ŝancon plu vivi, kaj sen kono de la propra historio oni ne povas eviti erarojn kaj misfarojn estontece."

Tomasz Chmielik skribas pri la bezono de kritika historio de la Esperanto-movado, precipe historio de la movado en la orientaj landoj, kie ankaŭ iuj esperantistoj, precipe Esperantaj funkciuloj, estis kunlaborantoj de sekretservoj kaj laboris kontraŭ senco de homaranisma ideo de Esperanto. Tiun opinion la redaktaro pravas tra la artikoloj kiuj estas plejparte ligitaj al literaturo, sed per literaturarojn en kiuj la plej interesa estas ilia socia senco.

Ni iomete trafolumu la revuon. Ĝi komenciĝas per tre interesa malferma prelego de la konsultiĝo de la 52-a Verkista Tendaro en

Magyarkanisza farita de Ēva Tóth: "Universala deklaro de la Lingvaj Rajtoj kaj genocido de lingvoj". Inter aliaj informoj pri interesaj libroj tie estas la recenzo de Andreas Künzli pri romano de Dagmar Leopold "Grüner Engel, blaues Land" (Verda anĝelo, blua pejzaĝo) en kiu la motivo estas tre interesa okazaĵo en tielnomita Neŭtral-Moresnet, kie ekde la jaro 1907 ekzistis grupo de esperantistoj kiuj tie intencis fondi Esperanto-ŝtaton nomitan "Amikejo". En la unua kajero estas ankaŭ ĉapitro el priesperanta romano verkata de Mikaelo Bronŝtejn

"Mi stelojn jungos al revado" kiu (la ĉapitro) okazas dum la unuaj jaroj de Sovet-Unio; poemego de granda pola poeto kaj esparantisto Julian Tuwim "La balo en opero" tradukita de Lidia Ligeza kaj du tekstoj, por mi la plej gravaj, la plej signifaj en ĉi-numero.

Unue, deko da paĝoj el la memorlibro de Halina Birenbaum "Espero mortas la lasta", en kiu estas priokribitaj teruraroj de hitlerismo, restado en mortkoncentrejo, kie ŝi restis sen ĉiuj siaj gefamilianoj kaj travivis nur dank' al feliĉo. Jam estinte en gasĉambro, kun aliaj samsortanoj ŝi atendis la finon, sed - mankis gaso.

Due, mian intereson kaptis "Akuzato Holzmann" de Trevor Steele, ĉapitro el ankoraŭ unu verkata romano.

Se Halina Birenbaum priskribas la rezultojn de hitlerismo, Steele priskribas kialojn de ĝia ekesto, ĝiajn radikojn en Germanio. "Felix Holzmann estis tiutempe fama poeto-redaktisto-jurnalisto, ĉefe konata pro la multjara redaktado de sia propra organeto *Das Feuer* (La fajro) (...) Preskaŭ sola li batalis por tuteŭropaj ideoj kaj idealoj. (...) Se lia internaciismo kaj lia senceda stilo jam iritis la "Votan-adorantojn", li kulpis pri peko neniel pardonebla: Felix Holzmann estis judo." Tial okazas atenco kontraŭ li. Li ŝajnis esti mortonta, sed mortis du jarojn poste. Okazis proceso kontraŭ du dungitaj atakintoj, sed ĉio transformiĝis en farson. La vera akuzato estis Holzmann, nur unu atakinto estis unu jaron malliberigita. Tiu sufoka atmosfero estas vera radiko de faŝismo. La juĝisto klare mesaĝis al Bavaroj kaj Germanoj kiel oni devas pensi kaj agi, kio estas patriotismo. Sed, ĉiu sincera leganto en tiu afero ne vidas nur tiun aferon, nek hitlerajn radikojn kaj similaĵojn: ĉiu el ni en tiu spegulo vidas almenaŭ sian vizaĝon kun fermita buŝo kiam iu senkulpulo suferas de fi-potenco kiuj ĉiam ekzistas ĉirkaŭ ni. Kaj ĝi fortiĝas per nia silento kaj forgeso. La tuta Eŭropo silentis tiam, kaj ankaŭ en multaj aliaj okazoj.

"Spegulo" volas, ke ni vidu nin, nian pasinton kaj nuntempon, klare kaj reale. Vidi, scii, diri, ne forgesi! Ĉar forgesitaj malbonoj kaj monstroj povas rehavigi sian potencon!



La ĉi-jara duobla laŭreato de Belartaj Konkursoj de UEA en proza branĉo kaj gasto en la ĉi-jara renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj en Kroatio

LENA KARPUNINA KELKVORTE



okupiĝas, ne tiel, ke mi ne ŝatas ĝin, nur ke mi mem ne verkas poezie. Pri aliaj prozaj branĉoj mi ankoraŭ mem ne scias, ĉu mi kapablas verki ion interesan, ĉar mi ne elprovis ilin.

ZE: *En la Esperanta literaturo vi aperis antaŭ 11 jaroj, pli precize per gajno de la tria premio en Belartaj Konkursoj de UEA en la jaro 1997. Temis pri via rakonto "Jaŝa", kiu estas konsiderata via unua presita verko. Kio intertempe okazis en via literatura kreado?*

La menciitaj du rakontoj estas ĝia rezulto.

ZE: *Via unua libroforma rakontaro "La Bato" aperis en 2001, kaj estis represita (kun kelkaj aldonaj rakontoj) en Moskvo en 2006. Nur unu jaron poste, aperis via dua rakontaro "Neokazinta amo". Ĉu ni povas konstati, ke per ĝi komenciĝas via intensa verkad-periodo? Kion ni povas atendi estonte el via plumo?*

Nu, pri intenseco mi ne povas garantiĝi (tio estas relativa). Oni ne povas produkti rakontojn samrapide kiel oni bakas kuketojn. Mia plej Satata Esperanta prozisto Jean Ribillard verkis nur du libretojn (unu nefinitan), sed ili restas perloj de nia Esperanto-literaturo. Produktiveco de la aŭtoro dependas de multaj faktoroj: interesaj kaj gravaj temoj, animekvilibro kaj trankvilo, inspiro ktp. Vi ne forgesu ankaŭ, kiel malafacile estis trovi eldonejon. Pro tio multaj aŭtoroj nuntempe mem eldonas siajn verkojn. Ĝis nun mi havis bonŝancon, sed ĝi ne estas garantiata. Sed, kompreneble, la legantoj povas kalkuli kun pliaj rakontoj de mi.

ZE: *Ĉu vi povus diri al niaj legantoj, kiu efektive estas Lena Karpunina?*

Mi estas rusdevena esperantistino el Duŝanbe (Taĝikio), kiu de pli ol dek jaroj verkas mallongajn rakontojn. Ĝis nun aperis en Esperanto du miaj libroj: "La Bato" kaj "Neokazinta amo".

ZE: *Ekde la komenco de via verkado, vi dediĉis vin al mallongaj prozaĵoj. Ĉu vi verkas ankaŭ poezion, tradukas aŭ okupiĝas pri aliaj literaturaj branĉoj?*

Ĝis nun mi verkis nur rakontojn kaj provis iom traduki el la rusa. Estas kelkaj rusaj majstroverkistoj, kiujn mi ege ŝatus traduki kaj peri ilin al esperantistaro, ekzemple Ĉehov, Ŝalamov, Ŝuŝkin. Des pli jukas min la tradukado, ke mi jam plurfoje vidis fuŝajn, grizajn tradukoj el diversaj lingvoj. Sed tuj ekestas la demando, kiu eldonas la tradukaĵojn? Kaj tio ĝis nun bremsis min, ĉar mi scias, kia granda problemo estas trovo de eldonejo. Pri poezio mi tute ne

La dua rakontaro de Lena Karpunina, aperinta pasintjare.



ZE: *Pri viaj verkoj pozitive esprimiĝis la plej gravaj nuntempaj verkistoj kaj recenzistoj, kiel ekz. Marjorie Boulton, Donald Broadribb aŭ Sten Johannson. Ĉu por vi pli gravas la opinioj de la recenzistoj, de la legantoj aŭ de la ĵurianoj kiuj ofte premiis viajn verkojn?*

Do, la recenzistoj kaj ĵurianoj finfine ankaŭ estas ja legantoj. Estas grave, ke la leganto ne enuu ĉe mia verko, ne ekdormu. Laŭdojn oni ja ĉiam volonte aŭdas! Sed foje iu recenzisto aŭ aŭtoro tafe substrekas (mal)frtaĵojn de miaj verkoj kaj analizas ilin, tio estas por mi tre grava ĉar mi povas ion lerni de tio.

ZE: *Dankon, ke vi regalis nin per via ĉeesto en la Verkista Renkontiĝo en Kroatio. Ĉu ni rajtas esperi, ke baldaŭ viajn verkojn ni povos legi ankaŭ en la paĝoj de "Zagreba Esperantisto"?*

Nu, kial ne?



Mi ricevis vian revuon "Zagreba Esperantisto", kiu estas luksa, perfekta laŭforme kaj riĉa laŭ enhavo.
Ivan Trifonov Minĉev (Veliko Tarnovo, Bulgario)

Antaŭ iom da tempo, nia leganto, leginte la informon pri Esperanta tombmonumento en Križevci kaj la rememorigan tekston pri 20-jariĝo post la morto de Ivo Lapenna, informis nin, ke en la loka tombejo de Šibenik (Tombejo de Sanka Ana), troviĝas memortabuloj al geesperantistoj Ivo Lapenna kaj Ljuba Knjažinskaja-Lapenna. Estante en la feriado en la regiono de Šibenik, la ĉefredaktoro sukcesis foti la tabulojn kaj ni konigas ilin al niaj legantoj.

La redakcio

KOREKTO

En la numero 3/2008 de nia gazeto, en la teksto "Gastado de mondfama interlingvisto Detlev Blanke en Zagrebo", en la 2-a linio de la unua kolumno sur la paĝo 76, erare estis skribite "junio" anstataŭ "majo". Efektive la vizito de d-ro Blanke okazis inter la 18-a kaj 22-a de majo.

La tekstaŭtoro kaj la redakcio pardonpetas pro la neintenca eraro.



Koran dankon pro la raporto pri la Tutmonda Kongreso de Ĵurnalistoj Esperantistoj! Bonege farita!

Povilas Jegorovas (Litovio)

Ni ne certas ĉu nia mesaĝo bone atingis vin, tial ni sendas ĝin denove. Ni pardonpetas pro eventuala duobla ricevo. Samtempe ni volus aldoni la jenan punkton: Vi estas libera publikigi niajn sloganojn en viaj naciaj, klubaj kaj aliaj revuoj. Tio permesos pli multe disvastigi pozitivajn ondojn tra la mondo. Simple menciu nian nomon kaj sendu kopion al ni por nia arkivo. Nia nova slogano "**En ĉiuj lingvoj tra la mondo, la koro estas la simbolo de amo.**" spekteblas en la hejmo de Movado sen Nomo, vidu <http://www.movado-sen-nomo.org/>

Ni ankaŭ havas novan forumon: <http://msn.ipernity.com> kie spekteblas la novaj, sed ankaŭ la malnovaj sloganoj. La forumo estas parto de Iperity, kie membras jam pli ol 1000 esperantistoj kaj kie eblas lasi mesaĝojn (post senpaga enskribo). Koran dankon,

La teamo de Movado sen Nomo.

"Zagreba Esperantisto" iras Bjalistokon perpiede kaj ankoraŭ ne atingis la urbon.

Ela Karczewska (Bjalistoko, Pollando)


Mi denove legis "Zagreban Esperantiston" unuspire. Ĝi estas ĉiam pli bona, mi gratulas. Tamen, kion signifas la enkondukaj artikoloj en la n-ro 3/2008? Ĉu komenciĝon de milito inter la verdaj kroatoj? Mi ne konas la interrilatojn, sed mi bedaŭras se ili ne estas bonaj. La fina viktimo ĉiam estas Esperanto.

Nikola Rašić (Roterdamo, Nederlando)

Estimataj gesamideanoj, Mi estas esperantisto de Francio. Mi interesiĝas pri interretaj paĝoj en Via lando por "aĉetado kaj vendado" de domoj, loĝejoj kaj kulturebla grundo. Ĉu iu povas sendi al mi tri plej popularajn interretajn paĝoj en Via lando?

Abbie Jerard (Francio) abbie.j05@gmail.com

DUBROVNIK

 *Divo Pulitika*

Perlo de Adriatiko

Oni konas ĝin kiel la Perlon de Adriatiko, unu el la plej belaj mezepokaj urboj en Kroatio kaj en la tuta mondo. Ĝi staras kiel memorsigno de la iama kulture kaj ekonomie riĉa Respubliko, pro kiu ĝiaj civitanoj eĉ hodiaŭ fieras. Ĝi travivis multajn jarcentojn ekde sia fondiĝo kaj donis al ni multajn memorindajn personojn, konstruaĵojn kaj verkojn.

Dubrovnik elkreskis el malgranda rifa kolonio Laus, kiun fondis fuĝintaj Latinoj. Sur la najbara tero kontraŭ la rifo baldaŭ loĝiĝis Slavoj. Ilia kolonio estis sub la monto Srđ, kie kreskis multaj kverkoj, kaj pro tio ili nomiĝis la kolonio Dubrava (kverkarbaro). Tiuj du kolonioj pli kaj pli konektiĝis kaj amikiĝis, kaj decidis sekigi la kanalon inter si. Tiel ekestis Stradun, la hodiaŭa ĉefa strato de la urbo.

Dubrovnik troviĝis en tiutempe tre maltrankvila, sed potenciale bona pozicio, kaj Dubrovnikanoj tre bone uzis tion. La urbo trovis sian lokon inter fortaj eŭropaj ŝtatoj, kaj iĝis komerca centro konektigante marajn kaj kontinentajn vojojn. Ĝia ekonomio tiel fortiĝis dank' al monopolo pri sal-komercado kaj unu el la plej grandaj ŝiparoj en la mondo, kun 180 ŝipoj.

La urbon terure detruis tertremo en 1676 kaj Dubrovnik tre malfacile refortiĝis. Post tio oni rekonstruis la urbon laŭ urba plano kaj per ŝtonoj. Ĉiu homo kiu volis eniri la urbon devis kunporti unu ŝtonon por helpi ĉirkaŭmuriĝi ĝin. Ekde tiam Dubrovnik havas sian hodiaŭan aspekton.

Sian politikan kaj ekonomian memstarecon la urbo konservis dum multaj jarcentoj. La baza eldiro en Dubrovnik estis "por neniu oro vendu liberecon". Tiun liberecon la dubrovnikanoj ne ebligis per armiloj sed per tre evoluinta diplomatio kaj belaj vortoj. Pro tio eĉ hodiaŭ oni diras "kun ĉiu estu bonmaniera, kun neniu vera". La liberemeco estas parto de dubrovnika kulturo, kaj al ĝi oni montras respekton ĉiufebruare dum granda festo de Sankta Blasio, protektanto de la urbo.

Pro tia libera ĉirkaŭaĵo Dubrovnik iĝis nesto por scienca kaj arta progreso, en kiu naskiĝis kaj evoluis grandaj saĝuloj kiel Marin Getaldić, Ruder Bošković kaj Benedikt Kotruljević aŭ artistoj kiel Marin Držić kaj Ivan Gundulić, kiu skribis himnon al libereco.

La hodiaŭa Dubrovnik estas malgranda sed kulture gravega kroata urbo, protektita de Unesko kiel memorsigno de monda heredaĵo. Ĝi ankaŭ estas granda turista centro kiu alvenigas precipe tiujn homojn kiuj amas kulturon kaj arton, sed ankaŭ tiujn kiuj ŝatas ĝui la puran maron, sunon kaj naturon. La urbo plaĝo Banje estis proklamita kiel la tria plej bela plaĝo en la mondo.

Ĉiujare dum la somero oni organizas festivalon de muziko kaj dramo *Dubrovačke ljetne igre* (Dubrovnikaj someraj ludoj) kiu ĉi-jare estas dediĉita al 500-a naskiĝdatreveno de la plej granda kroata komediisto Dubrovnikano Marin Držić.

Dubrovnik ankaŭ iĝas universitata urbo, kaj en ĝi agas interuniversitata centro kiu per sia programo gastigas sciencistojn el la tuta mondo.